
# BULGARA ESPERANTISTO

2 - 1980

organo de bulgara esperantista asocio






Nia „verda" rosmaro el u. Loveĉ — k-do Kiril Kalĉev, salutas siajn multnombrajn E-amikojn tutmonde.



Momento el la pasintjara XVa Ora Pola Aŭtuno en Miedzygórze (Mjendziguĵe), Pollando. Plenumas mallongan kantprogramon la bulgara grupo (de maldekstre): Cv. Radovanov kaj B. Andreev el Sofio, Nora Nedjalkova el v. Izgrev, Pleven-distr. (ŝi bonege kantis ankaŭ solon), Radka Liĉeva el Trjavna kaj Ljudmil Buĝev el Pleven. Al la grupo amike aliĝis ankaŭ la pola s-anino Jana Graczkowska, kiu recitis versaĵon „Ne foriru" de la bulgara E-poetino Penka Papazova. Ŝi estis afabla sendi al ni la informon kaj la foton. Dankon!

*ENHAVO*


* * * La laboro — bazo de la popola bonstato . . 1
* * * La antaŭkongresa konkurado en marŝo . 2
* * * Vigla E-agado en Asenovgrad . . . . . 2
* * * Literatura konkurso . . . . . . . . . 3
**M. Dimitrova.** Novjara festo . . . . . 3
**Barbara Gondek, Ilija Ivanov.** Valoraj rezultoj 3
* * * Verda Tabulo . . . . 4
**Emil Ĉirpanski.** Aŭtuna E-balo en Dospat . 4
**P. G.** Vigla E-agado en la piedoj de Rila . 4
**Stefan Sokolov.** El la vivo de „Herolbo" — Sofio . . . . . . . . . . . . . . . . . 4
* * * Centoj da Zamenhof-celebroj . . . . . 5
**Vladimir Jelev.** Literatura vespero pri Todor Ŝoŝev . . . . . . . . . . . . . . . 5
**Kanju Kanev.** Esperanto estas en mia ĉiutaga vivo . . . . . . . . . . . . . . . 6
**K. Vâlev.** Grava devo de la maljunaj esperantistoj. . . . . . . . . . . . . . . 6
* * * Konkurso de Monda Turismo . . . . . 7
* * * Gazeto „La Mondlingvisto" trovita . . 7
**Dimitro Denĉev.** Entuziasmo kaj sindonemo . 8
**L. Maĝarova.** El la pasinto al la estonto . . 9
**Boris Simeonov.** Rememoroj pri la kamarado . 10
**Trajana Petkova.** La neforgesebla Penka Miĥajlova. . . . . . . . . . . . . . . . 11
**Tatjana Koptjagina.** „LIRO-79" en USSR . . 12
* * * Esperantista societo en Kubo . . . . . 12
**Kunĉo Vâlev.** Inter gefratoj . . . . . . . 13
**Vladimir Bespalov.** E-gastoj en Soĉi . . . . 14
**D-rino Marjorie Boulton.** Inde prezentis sian landon . . . . . . . . . . . . . . . 15
**Emil Petkov.** Kiel mi estiĝis esperantisto . . 16
**E. G.** Varia Silvestra Balo en Budapeŝto. . . 16
La Internacia E-Muzeo en Vieno 50-jara . . 16
**Ljudmila Jevseeva.** Kuraĝa ansero . . . . . . 16
**Marin Bâcev.** Silab-enigmo . . . . . . . . 16
* * * De lando al lando . . . . . . . . . . III
* * * Nekrologoj pri Zafirka Dimitrova, Stefka Ĥristova, Vladimir Belskij . . . . . III
* * * Programo de Internacia Esperanto-kursejo .en Varna . . . . . . . . . . IV
* * * Tra la gazetaro . . . . . . . . .
* * * Deziras korespondi . . . . . . . . . . IV


**Sur la kovrilpaĝo:**

*La Nafto-Kemia Kombinato en Burgas — unu el la plej grandaj kaj modernaj ekonomiaj entreprenoj de socialisma Bulgario*


**Redakta Komitato:**

Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), **Vasil BOROVANSKI, Evgeni GEORGIEV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI** (vicĉefredaktoro), **Flori NIKOLOV.**

Administranto: **Metodi Garev**

Korektis: **Rajna Konstantinova**

**Sofio,** p. k. 66 Tel. 31-00-29

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

FEBRUARO
1980
2
JARO 49

# LA LABORO — BAZO DE LA POPOLA BONSTATO

*La bulgara popolo havas saĝan diron: „Kiel ni laboras, tiel ni vivos". Tion scias ĉiu laborhomo, ĉiu laborkolektivo en nia lando. Pruvo pri tio estas la rimarkindaj sukcesoj, kiujn nia popolo atingis en la konstruado de evoluinta socialisma socio dum la ĵus pasinta jaro. La plano pri socia kaj ekonomia disvolviĝo de la lando estis sukcese plenumita. La nacia enspezo kreskis per 6,5%, la industria produktaĵo — per 6,5%, la agrikultura — per 7%, la sociaj fondusoj por konsumado — per 4%. Plialtiĝis la konsumado de nutraj kaj aliaj varoj fare de la civitanoj. Tiaj sukcesoj estis atingitaj ankaŭ en la sfero de klerigo, kulturo, sanprotekto, sociaferoj. Tio estas sukcesoj, kiuj ĝojigas, ĉar malantaŭ ili staras la penoj, la kreado kaj la iniciatemo de milionoj da laboristoj, vilaĝanoj, specialistoj, gvidantoj — de la tuta popolo.*

*Nia lando eniras kuraĝe en 1980 — la lastan jaron de la sepa kvinjara plano. Nun, kiam metiĝas la fundamentoj de la oka kvinjaro (1981—1985) — kvinjaro de scienca kaj teknika progreso, antaŭ ĉiuj homoj de l'laboro ekstaras novaj, malsimplaj kaj respondecaj taskoj. Por ke la popola bonstato plue kresku, por ke Bulgario fariĝu ankoraŭ pli riĉa, prosperanta kaj forta, la plano pri socia kaj ekonomia disvolviĝo de la lando por 1980 j. devas esti plenumita kaj superplenumita. Tio signifas, ke la nacia enspezo devas kreski per 5,7%, la industria produktaĵo — per 6,3%, la realaj enspezoj de la loĝantaro — per 3%. Novajn sukcesojn devas atingi la loĝejkonstruado, sanprotektado, kulturo, socialaj aferoj ktp.*

*Tiuj ĉi gravaj, malsimplaj kaj respondecaj taskoj postulas nun pli ol ĉiam obstinon kaj sindonon. Ili povus esti plenumitaj, se ĉiu ĉe sia laborloko manifestas altan labordisciplinon, se li rilatas kun sento de postulemo kaj respondeco al sia laboro. Praktike tio signifas, ke ĉiu devas labori altkvalite kaj efektivece — produkti pli multe kaj pli bone, eluzante malpli da krudaĵoj, materialoj kaj laboro por produktaĵunuo, uzante plej bone maŝinojn, aparatojn, ilaron.*

*Niaj sukcesoj dependas de ni mem: de nia scipovo konstante perfektigi la socialisman organizadon de la laboro, plialtigi nian kvalifikecon, pli rapide kaj pli vaste apliki la plej novajn scienc-teknikajn atingojn, utiligi la sperton de la plej bonaj ĉe ni kaj en eksterlando. Antaŭ ĉiuj laborhomoj de nia lando staras la granda tasko eltrovi ĉiujn rezervojn por plialtigo de la socia produktiveco de l' laboro, por produktado de pli da valoraĵoj por la popolo. Ju pli ni estas bonaj dommastroj, ju pli ni scipovas apliki la ekonomian alpaŝon al ĉio kaj ĉie, des pli bonaj estos la rezultoj de nia laboro.*

*En tiu ĉi granda batalo por popola bonstato la bulgaraj esperantistoj kiel dignaj civitanoj de sia socialisma patrolando, kiel veraj patriotoj kaj internaciistoj devas esti sur sia laborposteno, esti modelo de iniciatemo, kreado kaj sindonemo. Ĉiu esperantisto, kie ajn li troviĝas, devas esti ekzemplo en la batalo por modela plenumo de la plano por 1980. Nur tiel li estos inda por la antaŭstarantaj 1300-jariĝo de Bulgario, por la 110a datreveno ekde la naskiĝo de V. I. Lenin kaj por la 100a datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov. Nur tiel li inde renkontos la 40an jubilean kongreson de la bulgaraj esperantistoj!*

## *NI ANKORAŬ KOLEKTU ABONOJN!*

**Apenaŭ en la komenco de februaro „REP" donis al ni precizan informon pri la rezultoj de la abonkampanjo. Evidentiĝis, ke ankoraŭ estas liberaj abonoj.**

**Distriktaj kaj societaj estraroj, aktivuloj, geamikoj, varbu ankoraŭ abonantojn al nia revuo! Ni inde renkontu nian 40-an! Sumojn kaj adresojn sendu nur al la kancelario de BEA!**

**Ni nepre atingu 6100!**

## ORGANIZA VIVO

# LA ANTAŬKONGRESA KONKURADO EN MARŜO

### DUA INFORMILO

Multaj societoj plifortigis la aktivecon en la kadroj de la antaŭkongresa konkurado honore al 40a jubilea kongreso de BEA kaj atingis novajn suprojn. Novaj societoj sendis informojn, sed la cifero de la mutantaj societoj estas ankoraŭ granda.

Karaj legantoj, vi tuj informiĝu ĉe la estraro de via societo, ĉu ĝi akurate informas pri viaj sukcesoj lige kun la konkurado. Nun aktualas la rezultoj de la abonkampanjo, la rezultoj de la kursoj dum la unua semestro, la bilanco de la internacia korespondado.

Ni informas por unua fojo pri la konkurado inter la asociaj sekcioj. Ankaŭ ĉi tie estas multo farenda.

Nia bilanco limiĝas ĝis la 12a de januaro. Denove ni informos pri la marŝo de la konkurado en la aprila numero.

UNUA KONKURGRUPO

(La E-societoj en la distriktaj urboj plus 5 s-etoj en aliaj urboj)

| Gradigo | Loĝloko | Societo | Poentoj |
|---|---|---|---|
| 1. | Sofia | „M. Gorkij" | 110 |
| 2. | Ruse | „Libero" | 93.5 |
| 3. | Pleven | „Eterna Amikeco" | 75 |
| 4. | Jambol | „M. Gorkij" | 67 |
| 5. | Trojan | „Balkana Stelo" | 63.5 |
| 6. | Kubrat | „Progreso" | 50 |
| 7. | Gălăbovo | „Kolombo de la Paco" | 42 |
| 8. | Ŝumen | „Vekiĝo" | 37.5 |
| 9. | Kazanlăk | „Roza Valo" | 35 |
| 10. | Pazarĝik | „Radio" | 22 |
| 11—12. | Burgas | „Nigra Maro" | 19 |
| | Plovdiv | „Kulturo" | 19 |
| 13. | Varna | „Albatro" | 17 |
| 14—16. | Kjustendil | „Flamo" | 13 |
| | Stara Zagora | „Verda Stelo" | 13 |
| | Tărgovište | „Verda Eskadrono" | 13 |
| 17. | Ĥaskovo | „Asen Zlatarov" | 12.5 |
| 18—19. | Loveĉ | „Espero" | 11 |
| | Vraca | „Sukceso" | 11 |
| 20 | V. Tărnovo | „Lumo" | 4.5 |
| 21. | Gabrovo | „Verda Torĉo" | 4 |
| 22. | Smoljan | „Kulturo" | 3 |
| 23. | Dimitrovgrad | „G. Dimitrov" | 2.5 |
| 24. | Vidin | „Espero" | 2 |
| 25. | Sliven | „Espero" | 1 |
| 26. | Blagoevgrad | „Espero" | 0.5 |

DUA KONKURGRUPO

(En la aliaj lokoj kaj laŭ profesio E-societoj)

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1. | Velingrad | „Stoju Kalpazanov" | 324 |
| 2. | P. Trămbeŝ | „Progreso" | 108 |
| 3. | Drjanovo | „Ivan Vladkov" | 51 |
| 4. | Orjaĥovo | „Georgi Stanev" | 28.5 |
| 5. | Sofia | „Heroldo" — poŝtistoj | 28 |
| 6. | Pavel Banja | „Supreniro" | 18.5 |
| 7. | Sofia | „L. L. Zamenhof" — medicinistoj | 18 |
| 8. | v. Dălboki | „Marko Ivanov" | 17 |
| 9. | Plovdiv | „Lumo" — blinduloj | 11 |
| 10. | Sofia | „Diĉo Petrov" — instruistoj | 10.5 |
| 11. | Samokov | „Rila Esperantisto" | 9 |
| 12. | Popovo | „Homeco" | 6.5 |
| 13. | Dospat | „Fajrero" | 6 |
| 14. | Sofia | „Prospero" — fervojistoj | 4 |
| 15. | Pomorie | „Trifon Ĥristovski" | 3.5 |
| 16—18. | Karlovo | „Vasil Levski" | 3 |
| | Ruse | „Ponto de l' Amikeco" — transportistoj | 3 |
| | Svoge | „Amikeco" | 3 |
| 19. | Sofia | „Ĥr. Botev" — fervojistoj | 2 |
| 20. | Marica | „Trakia Lumo" | 1.5 |
| 21—27. | Berkoviça | „Verda Stelo" | 1 |
| | G. Orjaĥovica | „Fervojista Impeto" | 1 |
| | G. Orjaĥovica | „Espero" | 1 |
| | Madan | „Bjalistok" | 1 |
| | Sviŝtov | „Danuba Stelo" | 1 |
| | St. Dimitrov | „Marek" | 1 |
| | Ĉepelare | „Diĉo Petrov" | 1 |
| 28—29. | Nikopol | „Petko Simeonov" | 0.5 |
| | Septemvri | „Aŭroro" | 0.5 |

TRIA KONKURGRUPO

(Studentaj, junularaj, lernejanaj E-societoj kaj grupoj)

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1. | Vidin | Junulara grupo ĉe s-eto „Espero" | 38 |
| 2. | Sofia | "Vela Peeva" — studenta | 22 |
| 3. | Sofia | „Vasil Levski" — junulara | 21 |
| 4. | Preslav | „L. L. Zamenhof" — lernejana | 17 |
| 5. | Plovdiv | „Studenta Impeto" | 12 |
| 6. | Vraca | „Verda Raketo" — lernejana | 3 |
| 7. | Smoljan | „Flugo" — studenta | 2 |
| 8. | V. Tărnovo | „Flamo" — studenta | 1 |

KVARA KONKURGRUPO

(Uzinaj kaj oficejaj E-societoj)

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1. | Preslav | „Ivan Kăndev" — uzina | 26.5 |
| 2. | Ŝumen | „Progreso" — uzina | 9 |
| 3. | Sofia | „48a Universala Kongreso" — uzina | 6 |
| 4. | Varna | „Fajrero" — oficeja | 4 |

KVINA KONKURGRUPO

(Asociaj sekcioj)

| | |
|---|---|
| 1. Instruista | 22 |
| 2. Literatura | 13 |
| 3. Poŝtista | 3 |
| 4. Fervojista | 2 |
| 5. Filologa | 2 |
| 6. Ĵurnalista | 1 |

### *VIGLA E-AGADO EN ASENOVGRAD*

La reveno de la esperantista familio Ĉirpanski (Emil kaj Velurina) septembron 1979 en Asenovgrad (la naskiĝloko de Emil) donis fortan puŝon de la E-movado en tiu urbo antaŭen. Jam komenciĝis vigla instrulaboro de E-o. Sub la gvido de Emil funkcias urba E-kurso en la E-klubejo, kiun partoprenas 30 personoj. En la lecionoj abundas kantoj, ŝercoj. Okaze de la Nova Jaro ĉiuj gekursanoj ricevis gratulleteron de sia kursgvidanto.

E. Ĉirpanski gvidas E-kurson ankaŭ en lernejo „Nevena Jordanova" — 35 lernantoj. 40 lernantoj komencis lerni E-on ankaŭ en lernejo „Nikola Vapcarov" sub la gvido de Velurina Ĉirpanska, diplomita E-instruistino.

Geedzoj V. kaj E. Ĉirpanski kolektis 110 abonojn al „Bulgara Esperantisto". Kion signifas tio oni bone komprenus, se oni memorigus, ke ĝis nun en Asenovgrad ĉiujare estis ĉ. 20—30 abonoj.

## ПРИЗИВ

### към ветераните на РЕС

Скъпи другари,

През 1980 г. се навършват 50 години от учредителната конференция на Работническия есперантски съюз (РЕС). Създаден в период на активен революционен подем, РЕС през годините на своето съществуване като класова организвция на българските есперантисти даде своя пряк принос в борбата срещу настъпващия фашизъм. В него израснаха борчески кадри, които продължиха борбата в редиците на революционния авангард до окончателната победа над фашизма и установяването на народно-демократичната власт в нашата страна.

Във връзка със славния полувековен юбилей Българската есперантска младеж поде инициатива за издирване на ветераните на РЕС. Поради тежките условия, при които са действували неговите членове, и отдалечеността по време, не е оставен архивен материал за дейността му. Ето защо с цел да се изготви списък на членовете на РЕС молим същите до 30. IV. 1980 г. да изпратят до редакцията на списание „БЕ" информация, по възможност съдържаща следните данни:

1. Име, презиме и фамилия на ветерана.
2. В коя работническа есперантска секция е членувал.
3. Брой на членовете на секцията.
4. Кой е бил секретар.
5. Година на основаване на секцията.
6. Имена на други живи членове на секцията, за които си спомняте.
7. Мероприятия на секцията, в които сте участвували или за които имате информация — месец и година.

Полезно би било, ако могат да се добавят някои неща извън посочената схема. Информацията може да бъде на български език или есперанто.

При наличието на снимки или друг архивен материал молим да ни бъде изпратен оригиналът или копие от него с кратко обяснение. Това ще помогне много при изясняването на различни страни от дейността на РЕС. Получените материали ще бъдат предадени на Българския Есперантски Музей.

*Българска есперантска младеж*
*редакция на сп. „Български есперантист"*

## LITERATURA KONKURSO

*Dediĉe al la 40a jubilea kongreso de la bulgaraj e-istoj, okazonta en julio 1980 en u. Plovdiv, la redakcio de „Bulgara Esperantisto" anoncas grandan literaturan konkurson. Ĝin povas partopreni ĉiu bulgara kaj eksterlanda esperantisto. La konkursaĵoj povas esti nur en la jenaj branĉoj: originalaj poezio, rakonto, kanto (teksto kaj melodio aŭ nur melodio de E-teksto), eseo, rememoro kaj tradukita poezio. Temoj liberaj.*

*Limtempo por prezento de la konkursaĵoj: la 1a de majo 1980 j. (validas la poŝta stampo).*

*La plej bonaj verkoj estos premiitaj kaj aperos en „Bulgara Esperantisto".*

*La konkurso estas sekreta.*

*La konkursaĵoj, maŝine tajpitaj, devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. La saman pseŭdonimon oni skribu ankaŭ sur fermita koverto, en kiun oni anticipe metu slipon kun la vera nomo kaj adreso de la aŭtoro. La konkursaĵojn kaj la fermitan koverton metu en pli grandan koverton kaj ĉion sendu rekomendite je adreso: Redakcio de „Bulgara Esperantisto", bulv. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario (por la konkurso).*

*Samideanoj, partoprenu amase nian literaturan konkurson!*

### NOVJARA FESTO

Tradicio en E-societo „Kulturo" en Plovdiv estas aranĝi amuzan novjaran vesperon. Ĉiam estas bongustaj manĝaĵoj kaj gaja programo, ne mankas muziko, kantoj, dancoj.

Dum la ĉijara festa vespero la ĉeestantoj estis surprizitaj de aparte kortuŝa momento: enmanigo de atestiloj al sep junaj e-istoj farintaj ekzamenon por la unua kaj dua gradoj. Al nia merita aktivulo Dimitro Ivanov pro lia ĉiujara bonega laboro dum la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto" kaj aliaj E-periodaĵoj estis solene enmanigita la ora honorinsigno de BEA. La prezidantino de „Kulturo" gratulis la diplomitojn kaj k-don Ivanov. Ŝi tralegis ricevitajn gratulleterojn el la lando kaj eksterlando.

En la programo partoprenis Toma Ajolov per propraj versaĵoj. Humurajojn rakontis Katja Petrova, Marija Stoeva, kantis Gălăbinka Piperova ka.

Je la fino de la vespero alvenis Avo Frosto kun plena sako. Starante apud la novjara arbeto, li disdonis donacojn.

**M. Dimitrova**

### VALORAJ REZULTOJ

La Klubo de la Esperantisto ĉe la Sindikata Kulturdomo en Loveĉ estas fondita en novembro 1978. Pasis nur unu jaro de la tago, kiam 30 entuziasmaj kaj agemaj e-istoj el ambaŭ societoj „Espero" kaj „Balkano" elektis novan vojon de organiza vivo.

Dum tiu ĉi mallonga periodo la klubanoj havis 10 prelegojn je kulturaj kaj socipolitikaj temoj, preparitaj de ili mem aŭ de lektoroj de la societo por disvastigo de sociaj konoj „Georgi Kirkov". Neforgeseblaj restos la renkontiĝoj kun ordenhonoritoj kaj distingitoj el Loveĉ, kun e-istoj el Trojan kaj Borima. Utila kaj agrabla aktiveco estis ankaŭ la printempa balo, organizita kune kun membroj de la Klubo de Kulturagantoj. Aktivo de nia klubo de la e-isto estas ankaŭ kurso por komencantoj, ekspozicio, preparita okaze de la Tago de E-libro, la bulteno, kiu regule informis pri la vivo de la klubanoj.

Pri tiuj ĉi valoraj aktivecoj parolis la prezidanto de la Klubo Coĉo Kolarov en la jarkunveno. Li emfazis, ke plej valora rezulto de nia unujara agado estas la aktiva kunlaborado kun aliaj kluboj kaj organizajoj. Dank' al tiu ĉi kunlaborado E-o en Loveĉ eliris el sia fermita medio kaj montris al la kultura publiko sian egalan rajton je utila kaj fruktodona vivo.

La jarkunvenon ĉeestis respondeculoj de la sindikatoj kaj 10 membroj de la Klubo de Ordenhonoritoj kaj Distingitoj, inter kiuj la Heroo de Socialisma Laboro kaj deputito en la Parlamento Ivan Kuracov — konstrulaboristo. Ĉiuj alte taksis la noblan agadon de la e-istoj. Per varmaj vortoj turnis sin ankaŭ la ĉefo de la ideologia fako ĉe la Distrikta Konsilio de Sindikatoj Nikola Dalekov kaj la prezidanto de DE de BEA Asen Matev, kiuj aprobis la multflankan laboron de la klubanoj kaj konfirmis plian subtenon kaj kunlaboron.

Post la oficiala parto la jarkunveno daŭris kun dancoj, tombolo, kvizo, amuzado.

**Barbara Ilieva,**
**Ilija Ivanov**

## Admirinda laboro

*Laŭ la informoj, ricevitaj ĝis nun en la redakcio, en la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto" por 1980 unuan lokon okupis k-do **Dimitro Ivanov** el Plovdiv, plurjare okupinta tiun lokon.*

*K-do Ivanov kolektis **160 abonojn** por «BE»!*



*Krome li kolektis ankaŭ: 21 abonojn por «Scienca Mondo», 10 por «Paco», 5 por «der esperantist», 2 por «Hungara Vivo».*

*Samtempe k-do Ivanov, helpante a societan estraron, kolektis la membrokotizon por 1979 de 130 e-istoj!*

*Ni gratulas sincere nian fervoran Isamideanon pro lia admirinda laboro kaj ni bondeziras al li firman sanon kaj multan feliĉon!*

## Aŭtuna E-balo en Dospat

Jam tri monatojn mi kaj mia edzino Velurina ne plu estas en Dospat, en tiu malgranda urbeto, kaŝita en la sino de ĉarma Rodopo, kie ni dek jarojn laboris ambaŭ kiel instruistoj kaj kie ni tiom multe da fortoj kaj tempo donis al E-agado. Kia estos la sorto de la juna E-societo „Fajrero", kiun ni tie fondis kaj tiel ame flegis? Ĉu niaj posteuloj plu tenos alte la verdan flagon? Vere, kiam ni adiaŭis, forveturante al mia naskiĝurbo Asenovgrad, ni aŭdis tiom da certigoj, ke la nobla E-afero ne mortos en Dospat, ke la semo, kiun mi jetis tien, daŭre fruktodonos. . . Sed tamen la timo ne forlasis min. . .

Kaj jen: telegrama invito al E-balo en Dospat! Komprenehle, tuja ekveturo! Ĝoja surprizo, scivolemo, senpacienco kaj amo miksiĝis en niaj koroj. . . Al Dospat! Al Dospat!

Jen ni alvenas. La noktaj lumoj de la konata urbeto signalas amike al ni. Jen la sama strato, la sama restoracio „Bor", kie ĝis nun ni aranĝis tiom da baloj! La ĉefaj organizantoj — niaj geamikoj Bojka Grozdanova, Irina Radeva kaj Eltimir Arĥipov — atendas nin ĉe la ŝtuparo de la restoracio. Sinceraj brakumoj kaj kisoj. Ni eniras kaj. . . estas kortuŝitaj. Kia bela E-ornamo, kiom multe da verdaj steloj kaj sloganoj sur la muroj! Malantaŭ la orkestro pendas nia amata societa flago. Miaj okuloj pleniĝas de larmoj, el la koro ŝprucas pura ĝojo kaj feliĉo. Cu mi povos regi mian voĉon por saluti tiom multe da e-istoj?!... Mia amo al tiu parto de nia patrolando pligrandiĝis dank'al E-o. La forlaso de Dospat estis mia E-doloro, sed nun mi vidas, ke nia 10-jara laboro ne estis vana.

Sub la ritmoj de „Vivu la verda stel'" Neli Petrova kaj unu nova e-istino rompas glason da ruĝa vino kaj malkovras la unuan aŭtunan E-balon. Dancoj, kantoj, rido, amuzado. Riĉa programo. Aparte interesaj estas la konkursoj. Tiurilate ĉi tie oni montras grandan inventemon. Dek tri konkursoj pri veraj „plej" kaj „malplej". Diversaj premioj. Ĉe kelkaj el ili eksplodas terskua rido.

Estis ankaŭ gastoj — el Goce Delĉev, el Smoljan, Asenovgrad, Devin, v. Satovĉa. Plej grava estis la renkontiĝo kun lokaj e-istoj aktivuloj: ili promesis, ke ankaŭ ĉi-jare „Fajrero" ne postrestos en la abonkampanjo de „BE" kaj aliaj E-periodajoj. Ĉiuj — Atanas Ŝopov, Lili Karabunarska, Bojka Grozdanova, Irina Radeva, Rosen Halaĉev k. a. — promesis plenumi inde la donitan planon, atingi la ciferon, kiun la redakcio de „BE" fiksis por la E-societo en Dospat.

Ĉirkaŭ la dua horo post meznokto la belega aŭtuna E-balo finiĝis. Kaj ĝin, kaj nian veturadon al ĝi, kaj la varmajn amikajn renkontiĝojn kaj adiaŭon ni memoros ĉiam.

**Emil Ĉirpanski**

---

### VIGLA E-AGADO EN LA PIEDOJ DE RILA

Vigla E-agado komenciĝis en la novaj urbetoj Rila kaj Koĉerinovo, situantaj en la piedoj de Rila-monto.

En Rila estis organizitaj du elementaj E-kursoj — unu por civitanoj, precipe junuloj, 16 personoj, kaj alia por junpioniroj — 20 infanoj. Ambaŭ kursojn gvidas Dimitrina Tonĉeva el Blagoevgrad, la unua diplomita E-instruistino en tiu urbo. Plej grandan meriton por la estiĝo de ambaŭ kursoj havas k-do Jordan Maznikov kaj la direktoro de fundamenta lernejo k-do Radkov, prezidanto de la loka E-societo „Libero".

En la bela klubejo de la societo, kiu troviĝas en la centro de la urbo, okazis kortuŝa celebro de la Zamenhof-naskiĝtago. Pri la vivo kaj agado de Zamenhof parolis k-dino Tonĉeva. Estis prezentita artprogramo de la kursanoj.

Ĉar nur kelkaj tagoj antaŭ tio estis la 77a naskiĝtago de k-do Maznikov — la unua e-isto en Rila, arda sociaganto kaj aktiva batalanto kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, oni ame kaj estime gratulis lin, dankis pro lia multjara laboro por E-o kaj enmanigis al li florojn kaj albumon. Floroj estis prezentitaj ankaŭ al Vasilka Pandurska — la plej bona kursanino.

Elementan kurson de E-o sub la gvido de nia ege aktiva s-anino Tonĉeva ekfunkciis ankaŭ en urbeto Koĉerinovo, kvartalo Barakovo. Ĝi estas miksita — por civitanoj kaj lernantoj, 24 personoj. Plej grandan kontribuon por la organizo de la kurso havas la instruisto Georgi Dimitrov, kiu samtempe estas la plej bona kursano.

**P. G.**

### EL LA VIVO DE «HEROLDO» — SOFIO

Regule ĉiumerkrede la membroj de poŝtista E-societo „Heroldo" en Sofio kunvenas, aŭskultas prelegojn, rigardas kolordiapozitivojn, okupiĝas pri lingvaj demandoj, planas sian partoprenon en diversaj E-iniciatoj ktp.

Je la 5a de decembro en la kunveno prelegis s-anino Vera Vâjarova. Ŝia prelego pri Svislando laŭ la libro de Arthus Baur „La fenomeno Svislando" provokis eksterordinaran intereson. Tiuj, kiuj ne havis la feliĉon ĉeesti la 64an UK de E-o en Lucerno, ekkonis per tiu ĉi prelego la belecon de la paca alta respubliko, la purecon kaj ĝentilecon de la svisoj, dommastroj de jam kvin UK de E-o.

La aŭskultantoj dankis kore la prelegantinon Vâjarova, esprimante sian kontenton, ke ŝi bonege prezentis la bulgaran esperantistaron per sia recitado de E-poezio en la MEM-konferenco en Lucerno.

**S. Sokolov**

## *CENTOJ DA ZAMENHOF-CELEBROJ*

*La 120an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof — la granda pacamanto kaj humanisto, estis solene celebrita de la bulgara esperantistaro. Jen kelkaj koncizaj informoj:*

**Sofio.** La sofiaj e-istoj partoprenis grandan tuturban solenaĵon dediĉe al la naskiĝtago de Zamenhof. La celebro okazis en la salono de popola legejo „Naturo kaj Scienco". Ĉeestis ĉ. 200 personoj. Prelegon pri la vivo, agado kaj ideoj de Zamenhof faris Nikola Aleksiev. Riĉa belarta programo.

**P. Canov**

**Stara Zagora.** La Zamenhof-solenaĵo okazis en klubo de Patrolanda Fronto. Organizantoj — la E-societoj en la urbo kaj modela popola legejo „Patrolando". Prelego pri Zamenhof kaj la laboro de e-istoj por paco kaj internacia amikeco faris inĝ. Petko Bonev. La belartan programon partoprenis la operartistino Rene Jordanova — laŭreato de Dimitrov-premio kaj prezidantino de la E-societo, ankaŭ amatoroj kaj la kanthoro de veteranoj.

**E. Zloĉevska**

**Drjanovo.** La Zamenhof-solenaĵo estis malfermita de Dimka Petrova — sekretariino de la Pacdefenda Komitato.

Raporton pri Zamenhof kaj la porpaca laboro de la e-istoj faris docento Georgi Dimov. Oni akceptis telegramon proteste kontraŭ la novaj frenezaj paŝoj de la usona militarismo kaj ĝiaj aliancanoj.

Fine — riĉa artprogramo. Estis malfermita ekspozicio el fotoj pri la vivo de la infanoj en kapitalismaj kaj socialismaj landoj.

**G. Manev**

**Jambol.** La 15-an de dec. 79 en montodomo „Amikeco" sur monteto Bakaĝici okazis renkontiĝo de e-istoj el Jambol, Burgas kaj Sliven, dediĉita al la 120a naskiĝtago de Zamenhof. Partoprenis ĉ. 60 personoj. Prelegon pri la kreinto de E-o, sincera, pacamanta kaj nobla humanisto faris Penka Papazova — sekretariino de la Distrikta-Urba Estraro de BEA. En la artprogramo partoprenis amatoroj kaj Galja Kostova — artistino en la opereto de Jambol. Estis ankaŭ kvizo, tombolo, amika amuzado.

**M. Jordanov**

**Ŝumen.** La Zamenhof-solenaĵo okazis en halo „Juneco" de la Sindikata Domo. Pri Zamenhof prelegis Veska Dragostinova kaj inĝ. Stefan Georgiev. Estis recititaj verkoj de Zamenhof. D. Penĉev lerte ludis per popola ŝalmo. Ĉar samtempe estas ankaŭ la Tago de la E-literaturo, oni aĉetis kaj donacis multajn E-librojn, abonis E-periodaĵojn ktp. Fine estis akceptita telegramo proteste kontraŭ la disvastigo de la nigra militnubo super Okcidenta Eŭropo, kie Usono instalas novajn raketojn.

**Cv. Todorov**

**Trojan.** La solenan Zamenhof-kunvenon salutis k-dino Stela Angelova — reprezentanto de la Sindikata Kulturdomo en la urbo. Prelegon pri Zamenhof faris Steljana Kavrâkova (sur la foto — sidanta). Sekvis riĉa belarta programo, poste — amuzado.

**L. Lalev**



El la Zamenhof-solenaĵo en Trojan

## LITERATURA VESPERO PRI TODOR ŜOŜEV

En la bulgara literaturo estas nomoj ankaŭ de blindaj verkistoj — Trajan Tâmen, Aleko Plamenov k. a. En nia nuntempo modeste, sed emocie verkas en bulgara kaj E-o la blinda e-isto Todor Ŝoŝev el Sofio. Elstara administra kaj socia aganto de la Asocio de Blinduloj en Bulgario, li pro sia literatura laboro estas kelkfoje premiita en diversaj literaturaj konkursoj — en nia lando kaj en eksterlando.

La 19an de decembro 1979 en u. Plovdiv estis organizita literatura vespero, dediĉita al la verkaro de Todor Ŝoŝev, kiun ĉeestis ankaŭ li. Sonis en E-o kaj en bulgara verkoj de Ŝoŝev. Unuafoje estis recitita lia poemo „Tempoj" de la artistino Veselina Kurteva — prezidantino de la urba E-societo „Kulturo" en Plovdiv. La juna blinda komponisto Georgi Ŝterev plenumis sian romancon laŭ la soneto „Du sangantaj koroj" de Ŝoŝev. La blinda E-poeto Danĉo Danĉev de Plovdiv tralegis propran verkon.

Multaj varmaj salutoj el Plovdiv kaj el la naskiĝurbo de Ŝoŝev — Karlovo — surŝutis la poeton. Profunde emociita, li dankis al ĉiuj. En konciza parolado li rakontis, ke li ĉiam klopodis esti utila al siaj samsortuloj. En poezia formo li esprimas siajn travivaĵojn de blinda homo, batalinta kontraŭ la malfacilaĵoj de la vivo en la kruda burĝa socio kaj partoprenanta nun aktive la konstruadon de nova, libera vivo en nia patrolando.

**Vladimir Ĵelev**

---

## *80 JAROJN ORGANIZITA E-MOVADO EN RUSE*

***Solena celebro:*** okazos je la 5—6 de aprilo 1980.

***Loko:*** la Distrikta Junulara Domo.

***Malfermo:*** je la 16 horo, 5 de aprilo.

***Kotizoj:*** 7 levoj por vespermanĝo kaj 2 levoj por noktado, ekskurso tra la urbo, jubilea insigno.

***Aliĝdato:*** la 25 de marto.

***Pliaj informoj***—de Stojĉo Cankov, p. k. 208, 7000 Ruse. Al li sendu ankaŭ aliĝkotizojn. Telefonoj: ofica 2-80-93, hejma 3-25-58.

Eksterlandaj gastoj pagos surloke.

Partoprenu amase la aranĝon!

---




## LA 36-a IJK EN RAUMA, FINNLANDO

Jam aperis la Unua Bulteno pri la 36a Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Ĝi okazos inter la 25a de julio kaj la 1-a de aŭgusto en urbeto Rauma (Sudokcidenta Finnlando). Rauma estas konata kiel malnova marista kaj puntofaristina urbo kun sia dialekto, kie la etoso de la pasinteco ankoraŭ ŝvebas inter la lignaj domoj de la urbocentro.

La Loka Kongresa Komitato aktive laboras por krei kongreson, kie E-o povos efektive renkontiĝi kun la „cetera mondo". Tiurilate estas promesplena la kongresa temo „Popola kultura tradicio en nuntempa mondo". Ĝi ebligas kunlaboron kaj kun la granda Finna Junulara Asocio, kaj kun la „puntosemajno" — ĉiusomera festoperiodo de Rauma, kiu okazos samtempe kun la kongreso. La kulturaj, laboraj kaj distraj programeroj sekvos la ĝeneralan skemon de IJK-oj, sed ankaŭ aldoniĝos finna kaj norda nuanco al la internacieco.

Pliajn informojn donas LKK de la 36a IJK, Anundilankatn 3, SF — 26100 Rauma 10, Finnlando.

NIA AKTIVULO

## ESPERANTO ESTAS EN MIA ĈIUTAGA VIVO

Per tiuj ĉi vortoj la vicprezidanto de E-societo „Kolombo de la Paco" en urbo Gălăbovo (distrikto de Stara Zagora) Radi Radev komencis sian respondon al la demando: „Kiel vi laboras por la progreso de la E-moovado?"

Radi naskiĝis en 1955. Li finis la mezan teknikan lernejon pri energetiko „Generalo Vladimir Zaimov" en urbo Gălăbovo. Post eksiĝo el la militservo Radi en lernojaro 1976/77 aliĝis al E-kurso, kiun li finis plensukcese kaj elstaris kiel aktivulo. En 1977 li finis II-an gradon en la Internaciaj E-kursoj en Burgas — Meden Rudnik. En la ĉiutaga vivo Radev ĉiam trovas konvenan okazon por paroli pri E-o, klarigi kaj propagandi. Ofte li proponas bonajn iniciatojn pri okazigo de diversaj aranĝoj por variigo de la societa vivo kaj agado. La E-klubo estas lia dua hejmo.



En 1978 oni elektis k-don Radi vicprezidanto de la E-societo. Li bonege plenumas siajn devojn. Lige kun la celebro de la 5-jara datreveno ekde la fondo de la societo li estis distingita de CE de BEA per la arĝenta jubilea insigno kaj medalo „Aktiva membro de BEJ". Por la 34a Internacia Junulara Kongreso en V. Tărnovo li estis gvidanto de la societa delegitaro kaj aktive partoprenis la kongresajn aranĝojn.

En majo 1979 k-do Radi Radev edziĝis al samideanino Mata Peneva. Dum la edziĝfesto, kiun partoprenis ĉ. 400 homoj, regis vera E-atmosfero, kio estis bonega propagando pri E-to. Post la geedziĝo Radi kaj lia edzino laboras kun plia ardo por la progreso de sia amata E-societo.

Multiĝu la vicoj de la bulgara E-movado per tiaj entuziasmaj adeptoj kaj aktivuloj kiel k-do Radi Radev!

Kanju Kanev

## *GRAVA DEVO DE LA MALJUNAJ ESPERANTISTOJ*

*En la fakkunveno de Veterana Esperantista Klubo enkadre de la 64a UK de E-o en Lucerno oni starigis la demandon pri grava E-devo de la maljunaj e-istoj — interesigi siajn genepojn pri nia lingvo, se eble ankaŭ instrui ĝin. Tiun devon aparte substrekis s-ano Walder Romanskorn, kiu en sia prelego rakontis, ke li sukcesis esperantigi sian tutan familion. La filo de lia filino Ruth estis baptita dum la diservo de KELI en Bienenberg ĉe Liestal la 5an de aŭgusto 79. Post s-ano Walder ankaŭ aliaj geveteranoj rakontis pri siaj sukcesoj interesigi nepojn al E-o.*

*Estas konata la granda amo de nepoj al siaj geavoj. En multaj familioj geavoj estas la ĉefaj prizorgantoj de nepoj dum foresto de la gepatroj, kiuj laboras, ofte havas aliajn neprajn okupojn, iras gaste ktp. Do, ekzistas multa libera tempo kaj plej favoraj hejmaj kondiĉoj por instrui E-on al la idaro laŭ tute praktika, natura, rekta metodo, samkiel oni lernas sian gepatran lingvon. Iom post iom la konversacioj inter la reprezentantoj de tiuj du plej malproksimaj laŭ aĝo generacioj povas fariĝi nur esperantlingvaj. Tiu laboro devas komenciĝi ekde plej frua aĝo. Ĝis la lernejtempo la infano povas esti jam bona e-isto.*

*En nia lando oni konas imitindajn ekzemplojn de simila frua esperantistiĝo dank'al konscia plenumo de E-devo fare de maljunaj e-istoj.*

*Ni danke akceptos kaj aperigos en nia revuo rakontojn pri similaj okazoj, ankaŭ fotojn. Bonvolu sendi tiajn materialojn al ni!*

K. Vălev

# Konkurso de Monda Turismo

*Okaze de sia 10-jara jubileo la asocio MONDA TURISMO anoncas novan programon de la kampanjo „Esperanto en la Turismo" por plivastigi la uzadon de E-o en la internacia turismo. La estraro de Monda Turismo alvokas ĉiujn e-istojn partopreni la efektivigon de la jenaj taskoj:*

1. Ekinteresigi vojaĝoficejojn pri E-o.
2. Konvinki ĉiĉeronojn kaj ekskursgvidantojn en vojaĝoficejoj lerni E-on. Ankaŭ vi partoprenu kurson kaj fariĝu ĉiĉerono kaj ekskursgvidanto.
3. Informi nin pri hoteloj, kampadejoj, oficejoj, entreprenoj, restoracioj, kiuj priservas internacian turismon kaj utiligas E-on.
4. Instigi vojaĝoficejojn kaj eldonejojn eldoni prospektojn, gvidlibrojn, mapojn, ilustritajn poŝtkartojn, glumarkojn k. a. en E-o.
5. Aranĝi ekspozicion, vitrinon aŭ aliforme prezenti atingojn de la internacia E-turismo.
6. Informi kaj varbi por E-aranĝoj, anoncitaj en la turisma E-kalendaro.
7. Partopreni internaciajn E-aranĝojn, renkontiĝojn k. s. kaj raporti al ni pri siaj impresoj. Se eble oni ilustru la skribitajn impresojn per fotoj kaj diapozitivoj.
8. Aperigi artikolojn pri utiligo de E-o en turismo en naciilingvaj kaj E-revuoj.
9. Proponi al organizantoj de internaciaj aranĝoj utiligi E-on.
10. Fariĝi membro kaj fakdelegito pri turismo.
11. Aliĝi al asocio Monda Turismo kaj varbi membrojn por ĝi.
12. Elpensi kaj proponi novajn eblecojn por disvastigo de la E-turismo.

Raportojn pri la farita agado en 3 ekzempleroj oni sendu ĝis la 31a de oktobro 1980 al la respondeculino pri la kampanjo „Esperanto en Turismo" s-ino Elizabeta Pallos, Ybl. Miklos u. 9, I et. 2, H-7633 Pecs, Hungario.

La estraro de Monda Turismo dum la VI Internacia Foiro de E-turismo, kiu okazos en 1980 j., pritraktos la raportojn kaj aljuĝos jenajn premiojn inter la konkursantoj:

5 senpagajn restadojn en 1981 j. dum la „Tagoj de Bydgoszcz", kiujn donacis „Esperantotur", Pollando;

3 senpagajn restadojn dum la Turista E-Semajno 1981 en Slovaka Paradizo, kiujn donacis Asocio de E-istoj en Slovaka Socialisma Respubliko;

3 senpagajn restadojn en Pecs dum la Semajno de Internacia Amikeco 1981 j., disponigitaj de la Turisma Komisiono de Hungara E-Asocio;

1 senpagan partoprenon en E-aranĝo en Finnlando (elektebla de la gajninto) en 1981 j. La premion disponigis E-Asocio de Finnlando.

Krom la 12 supremenciitaj premioj la estraro de Monda Turismo aljuĝos pliajn premiojn, disponigitajn dum la jaro de la organizantoj de internaciaj E-aranĝoj.

LA ĈARTO DE LA TURISMO

1. Turismo regeneras viajn fortojn, ĝi helpas al ĉiuj ekkoni la mondon.
2. La naturo kaj la kulturaj akiraĵoj estas ĉies posedaĵo, kaj vi estas pri ili respondeca.
3. Turisto estas via amiko — servu al li per konsilo kaj helpo. Por ke vi povu tion fari en iu ajn parto de la mondo, ellernu Esperanton.
4. Vizitu tion, pri kio vi legis, legu pri tio, kion vi vizitos.
5. Allasu la naturon paroli — ne faru bruon!
6. Lasu la restadlokon en tia stato, en kia vi deziras ĉiam trovi ĝin.
7. Fajro kaj vitro estas fonto de danĝeroj, estu atenta.
8. Alkoholo estas malamiko de la turisto: evitu ĝin dum ekskursado.
9. Estu ŝingarda, via facilanimeco endanĝerigas vin kaj aliajn.
10. Turisto ĉie estas gasto, lasu post vi bonajn impresojn.
11. Ne estu indiferenta pri maldeca konduto de aliaj.
12. Bona humoro kaj humuro helpas al la turismo en ĉiu situacio. Ekridu!

Ĉiu esperantisto — aktiva turisto kaj membro de Monda Turismo!

Feriado en Esperantio estas korpa kaj mensa malstreĉiĝo en agrabla amika internacia medio!

Por feriado en Esperantio bonvolu konsulti la internacian turisman E-kalendaron. Senpage ĝin ricevas ĉiuj membroj de la Asocio Monda Turismo.

Amase partoprenu la internacian kurson por E-ĉiĉeronoj kaj ekskursgvidantoj. La kurso estos organizita dum la aŭtuno de 1980 en la nova, moderna, granda kaj bone ekipita internacia E-kursejo en Smoljan, Bulgario.

**Estraro de Monda Turismo**

---

## GAZETO „LA MONDLINGVISTO" TROVITA

La dua en la mondo E-gazeto „La Mondlingvisto", eldonita en Bulgario, estis longe konsiderata por ĉiam perdita. Ĝi troviĝas nek en la Nacia Biblioteko „Kiril kaj Metodi" en Sofio, nek en iu alia bulgara publika biblioteko, nek en Internacia E-Muzeo en Vieno.

Kaj jen ĝi estas trovita. En aŭgusto 1979 j. dum ordigo de la havaĵo de Bulgara Esperanto-Muzeo ĝia honorofica administranto s-ano Krâstju Karucin, konata bibliografo, hazarde trovis jarkolekton de ĝi. La gazeto estas bindita kune kun aliaj sep bulgaraj E-libroj. La volumo apartenas al la privata biblioteko de la E-pioniro Vasil Gaŝevski el u. Bjala Slatina. La biblioteko estas donacita al BEA antaŭ multaj jaroj, sed ne estis bone pristudita.

La gazeto estas en formato 11,5×15 cm (post la bindo), sen kovrilo. Sur la unua paĝo estas la nomo (en Esperanto), subtitolo (paralele en Esperanto kaj bulgara): „Gazeto por la amikoj de l'lingvo Esperanto. Eliras du fojojn en la monato". Sekvas informoj (ankaŭ esperante kaj bulgare) pri la abonkotizo kaj la maniero de abono. Kiel administranto-eldonisto estas fiksita M. S. Bogdanov. La jarkolekto estas montrita en germana „Jahrgang". Datumita: Sofio, 8/20 Decembro 1889. La numero 2 (sen montro de la numero) estas datumita: „Sofio, 11/23 Decembro 1889". La tria numero mankas.

La paĝigo de ambaŭ numeroj estas komuna. La unua — de paĝo 1 ĝis 54, la dua — de paĝo 55 ĝis 64. La enhavo de numero 1 estas precipe en bulgara, plej parte argumentado pri la nova lingvo, kaj en Esperanto (9 paĝoj) kun modelaj tekstoj en Esperanto el la „Unua Libro". La dua numero post alvoko dupaĝa, paralela en bulgara kaj Esperanto, al la legantaro, prezentas la E-gramatikon. La enhavo de ambaŭ numeroj estas la esenco de la lernolibro por bulgaroj de Miloslav Bogdanov, la redaktoro de „La Mondlingvisto", eldonita en 1890 j.

# ENTUZIASMO KAJ SINDONEMO

Nun Marija Zlatareva estas 81-jara kaj loĝas en urbo Svištov, kie ŝi havas domon kaj nomon de bona civitanino, partoprenanta en la tuta socia kaj kultura vivo de la urbo. Ŝia nura filo forpasis antaŭ kelkaj jaroj.

En la E-societo de Svištov „Danuba Stelo" Marija Zlatareva trovis medion, kiu respondis al ŝiaj altaj spiritaj streboj. Si estiĝis aktivulino de la societo. En 1968 Zlatareva gvidis kurson, faris prelegojn per la urba radio. En 1971 ŝi estis sekretariino kaj poste prezidantino de „Danuba Stelo". Dum sia kvarjara restado en Sofio ŝi membris en E-societo „M. Gorkij".

Svištov estas konata kiel urbo de donacantoj. Riĉaj sviŝtovanoj en la pasinteco donacis al la urbo lernejojn, legejon ka. Estante fidela al tiu nobla tradicio, Marija Zlaterava donacis al muzeo „Aleko Konstantinov" kolekton el oraj kaj arĝentaj objektoj, ellaboritaj de ŝia patro (ŝia nomo devenas el la vorto „zlatar" — „oraĵisto"; ŝiaj patro, avo kaj praavoj estis oraĵistoj). Al muzeo ŝi donacis ankaŭ mane ellaboritajn de ŝia patrino objektojn.

Sian domon Zlatareva testamentis al E-societo „Danuba Stelo" en la urbo. Do, bona homo ĉie kaj ĉiam estas bona.

81 jarojn! Longa, riĉa vivo, en kiu efektiviĝis multaj bonintencaj faroj.

La patrino lasis Marija-n 12-jara. Kiel la tiamaj infanoj, ŝi studis la unuajn jarojn en la muzeo „Aleko Konstantinov", poste en iu preĝejo. Dum la milito de 1915 pereis ŝia frato Stilijan, e-isto. Kvar monatojn poste forpasis la patro. Semajnon antaŭ tio — la bona onklo. La vivo de Zlatareva estas vivo de orfino, kiu konas nur la laboron, la mankojn kaj la batalon kontraŭ malfacilaĵoj. Estas interese scii, kiel la lernantino Marija dum la milito, kiam ŝia



lernejo estis fermita, estiĝis instruistino. Ŝi venis Sofion kaj vizitis la Ministerion de la Popola Klerigo. Tie inspektoro demandis ŝin: „Kion vi volas, lernantino?" „Mi deziras esti instruistino!" — per kategoria tono respondis ŝi.

Post nelonga interparolo li avertis: „La laboro de instruistino estas malfacila. Ĉu vi povus porti la krucon?". „Jes! — denove firme respondis la junulino. Ekde miaj infanjaroj mi deziras fariĝi instruistino!" „Dio gardu vin!" — konkludis la inspektoro.

La pakaĵo (duonsako da faruno, vestoj, litkovriloj, libroj) estis ŝarĝita en ĉaro. Marija marŝis piede preter la ĉaro. Tiel ŝi alvenis en vilaĝon Gorna Verenica, distrikto de Mihajlovgrad. Kortuŝe estas aŭskulti la rakonton de Zlatareva, kiel oni akceptis ŝin en la vilaĝo, kie du jarojn la infanoj ne havis instruiston, kiel ili kolektiĝis kaj ĝojis. Ŝi komencis instrui sen kiaj ajn konoj kaj sperto pri la profesio. Sed ĉu povis agi alimaniere la filino de la oraĵisto, kiu ne havante pli ol 16 jarojn iris al la fronto batali por la libero de la ĵus liberigita el otomana jugo patrujo?

La milito finiĝis kaj Marija Zlatareva revenis en sian naskiĝurbon por fini la studadon en la tiama komerca gimnazio. Poste ŝi studis pedagogion kaj filozofion en Sofio kaj. . . denove instruiŝtino — en Sofio, Ĥarmanli, Sevlievo, Ĥaskovo, Burgas, Berkovica, Silistra, Svištov. 30 jarojn en diversaj urboj kaj vilaĝoj de la lando.

Nun Marija Zlatareva estas emeritino. En Svištov oni konas ŝin kiel tre konsciencan virinon, kontraŭstarantan al ĉiu maldecaĵo, kiel batalantinon por etikaj rilatoj inter la homoj. En sia naskiĝurbo ŝi ĝuas veran estimon. La nuna prezidanto de E-societo „Danuba Stelo" d-ro Blagovest Toŝev diras: „Ŝi estas honesta kaj idea virino, kun alta konscio kaj altruismo. Tial iuj, kiujn ŝi senmaskigas kaj kritikas, malamas ŝin. . . Sed por la plejmulto de svištovanoj kaj por niaj societanoj ŝi estas tre estimata, kaj oni montras ŝin kiel imitindan ekzemplon."

La donaco, kiun kamaradino Marija Zlatareva faris al E-societo „Danuba Stelo", montras entuziasmon kaj sindonemon, sen kiuj movado, kiel la esperantista, ne povas progresi. Tiu idea forto, kiu trovas plej diversajn formojn de aktiveco, estas garantio pri tia progreso.

Kompreneble, la testamento de Zlatareva estas ne nur ekzemplo, sed ĝi havas ankaŭ grandan signifon por la vivo de societo „Danuba Stelo". Oni devas profiti tiun domon plej racie por vigligo de la E-vivo en la urbo. Car en Svištov abundas junuloj — tie funkcias multaj lernejoj — mezgradaj kaj superaj, tie la grundo estas tre favora por kreiĝo de potenca E-movado.

**Dimitro DENĈEV**




# 1300 jaroj

## EL LA PASINTO AL LA ESTONTO

Komenciĝis la 1299a jaro de la Bulgara Ŝtato — tempo de streĉa laboro, tempo de pensado pri ĉio, kion ni trapasis kiel popolo en nia longa historia vojo.

Se tio, kio estis, ne irus al la estonto, ĝi restus morta. Se la hodiaŭa tago ne komprenus la pasintan, ĝi irus al la estonto kun ĉirkaŭligitaj okuloj. Malgraŭ ĉiuj peripetioj de nia sorto aŭ, povas esti, ĝuste pro ili, ni apartenas al feliĉa popolo, riĉa kaj je travivito, kaj je energio por konstruado. La supreniro kaj la kreado donis al ni fidon je niaj propraj fortoj. La sufero faris nin kapablaj kompreni tion, kio estas ekster ni, ŝirmis nin kontraŭ la limigiteco, kiu ofendiĝas pro la multformeco de la mondo.

Bulgario havas la sorton esti la unua organizita eŭropa ŝtato post la komenco de nia erao, kaj ĉio, kreita dum ĝia 13-jarcenta ekzistado, estas nia spirita havaĵo. La vivaj ikonoj kaj la ruinoj de la antikvaj ĉefurboj; la demokratismo de la slava literaturo kaj kulturo kaj la oraj turoj de la scio en la jarcento de Simeon; la frua ribelo de la bogomiloj kontraŭ la teraj maljustaĵoj kaj de la majstro de Bojana kontraŭ la kanonoj de la mezepoka arto; la rapida kresko en la fino de la kvinjarcenta jugo, kiu donis al ni la ĉiuflanke dotitajn Levski kaj Botev; la apostoloj de la socialismo. . . Ĉio ĉi estas trezoroj ne malpli grandaj ol tiuj, kiuj ĉiu ŝatanto de la arto povas vidi en la ekspoziciaj haloj de la grandaj centroj de la mondo.

Tiu ĉi heredaĵo apartenas al la popolo, kies laboro kaj altaj streboj en la epoko de la socialisma revolucio ŝanĝis radikale la hereditan vivmanieron. Trastudi tutece nian heredaĵon, vidi ĝin en ĝia plena brilo kaj transdoni ĝin al la venantoj post ni — tio estas parto de nia patriota devo antaŭ la sojlo de nia 14a jarcento.

Ne malmulte, sed tamen ne sufiĉe ni pensis pri unu nacia kvalito, formita de la komplika kruciĝo de spacoj kaj movadoj sur la loko, kie nia popolo elektis. Tio, kion hodiaŭ ni nomas internaciismo, naskiĝis jam en malproksimaj jarcentoj, kiam ni malkaŝe interrilatis kun aliaj civilizoj kaj kulturoj, kiam ni pruvis nian kapablon kompreni kaj akcepti ĉion plej bonan el la fremdaj atingoj sen vualigi nian propran rigardon. Tiu ĉi trajto, plej grava por la estonto, ordinare aperas post realigo de la naciaj streboj kaj ardaj deziroj. Ĝin nia popolo posedas tre frue. Eble pro tio, ke ĝi frue ekkonis la ĝojon esti egala inter la unuaj. Ĝi konservis la larĝecon de la nacia konscio ankaŭ dum la jaroj de jugo kaj forgesiteco kaj transdonos ĝin al tiuj, kiuj konstruos la sekvajn jarcentojn de Bulgario. Hodiaŭ ni efektivigas ĝin per nia interesiĝo pri ĉiu evento en la vasta mondo, per nia subteno al ĉiu justa afero kaj batalo, per nia soifo ekkoni la tuthomaran kulturon, per nia preteco dividi ĉion nian kun la ceteraj popoloj.

La nacia limigiteco estas peza malperfektaĵo por grandaj kaj malgrandaj popoloj. Ni devas esti dankaj, ke la 1300-a historio de Bulgario ne dotis nian popolon per ĝi.

L. Maĝarova

### BIZANCAJ KRONIKISTOJ PRI NI

SIGINBERT. „Kroniko" de XI jc.

Jaro 680. La bulgara tribo, kiu venis el Skitio, furiozis ĉie, precipe en Tracio, sub la gvido de Asparuĥ. La armeo de imperiestro Konstantin, kiu alfrontis ilin, estis malhonore forpelita kaj entute disbatita. La atakoj de la bulgaroj kontraŭ la bizanca ŝtato tiel fortiĝis, ke la imperiestro estis devigita fari kun la bulgaroj packontrakton kaj pagi al ili ĉiujaran imposton. Ekde nun oni devas noti la ekziston de bulgara ŝtato.

TEOFAN ORTODOKSO. El „Kronologio" de IX jc.

. . . Kaj tiel, instaliĝinte sur tiuj lokoj (sude de Danubo — *noto de trad.*), la bulgaroj fieriĝis kaj komencis ataki kaj konkeri la fortikaĵojn kaj la regionojn, kiuj estis sub bizanca potenco. Devigita de tio la imperiestro faris packontrakton kun la bulgaroj, konsentante pagi al ili jaran imposton por malhonoro de la bizancanoj pro niaj multaj pekoj. Ĉar mirige estis por proksimaj kaj malproksimaj (popoloj) aŭskulti, ke tiu, kiu faris siaj impostpagantoj ĉiujn — en oriento kaj okcidento, en nordo kaj sudo — estas venkita de tiu ĉi novaperinta popolo.

El bulgara: St. Kostadinov

LA USONAJ RAKETOJ EN OKCIDENTA EŬROPO AŬ . . .



— Mi petas, sinjorino! Ne timu — tio tute ne doloros...

Nikola Vapcarov estas sufiĉe konata por ĉiuj. Li atingis pinton en la revolucia poezio. Sed li estas konata ankaŭ kiel aktiva revoluciulo, batalanto kun armilo en mano.

Tamen kiel fidelan kamaradon samlaborulon ĉe la kaldronforno — malmulte da homoj konas lin. Ni ambaŭ estis hejtistoj ĉe la vaporkaldronoj. Ni estis samaĝuloj kaj fidelaj amikoj samprofesianoj. Li finis la maristan maŝinlernejon en Varna, kaj mi — la maŝinlernejon en Sofio.

En la kategorioj de la industrio tiu ĉi speco da laboro estas tiel nomata „nigra laboro". Sed de sociala kaj profesia vidpunkto tiuj ĉi laboruloj tamen estas iom diferencaj. Ili ja similas, figure dirite, la soldatojn dediĉitajn al sendanĝerigo de bomboj (vaporkaldrono estas potenciala bombo kun ege danĝera efiko). La profesio mem formis parton de ilia karaktero — psike kaj fizike. Precizeco, atentemo kaj sentimemo, kiu facile transformiĝas en braveco (se necese).Koncize dirite, tia estis Koljo (tiel mi nomis lin).

Li estis preciza en sia laboro, en sia skribo kaj esprimkapablo. Lia poezio — trafa kiel martelo sur amboson. Ĉion verkitan li „provadis" antaŭ siaj amikoj — do, ni kun emo aŭskultadis ĉion de lia propra voĉo. Estis ankaŭ alia nia komuna kamarado — Ilija Bojaĝiev, kies poezio estis sarkasme gaja. Koljo kaj Ilija estis niaj amatoj.

En tiu tempo (1936—40 jaroj) la vivo de la junaj laboruloj estis treege interesa. Ofte eĉ aventuroplena kaj riska, sed por ni tio estis ordinara ĉiutageco.

Nun mi dezirus rakonti al vi travivaĵon el tiu tempo.

Ekster la entrepreno mi havis ankaŭ aliajn fidelajn amikojn — esperantistojn kaj abstinulojn. Estis la lasta tago de aprilo 1936 j., posttagmeze. Nia esperantista triopo Nikola Ŝopov kaj Metodi Panĉev devis viziti unuamajan kunvenon organizitan de Junulara Abstinula Societo „Ustrem". Ĉar estis ankoraŭ frue, ni promenadis sur str. Klementina (nun bul. Al. Stambolijski). Kiam ni alproksimiĝis al la preĝejo „Sveta Nedelja", jen al la firmamento leviĝis ruĝa balono kun pendanta flageto. Kompreneble, por ni speciale, ege ĝojiga evento, ja morgaŭ estas la Unua de Majo — nia laborista festo.

Kiel aspektis niaj vizaĝoj kaj okuloj ni ne scias, sed subite en unu sama momento sur la ŝultroj de nia triopo sentiĝis la forta manpreno de du civilaj kaj unu uniforma policistoj. „Ha, kamaradetoj, vian ĝojon kaj ridetojn ni komprenas, sed ni montros al vi, kiom kostas ĉio!" Eskapi kaj forkuri ne eblis. Oni kondukis nin al la I-a policejo sur str. „Sofronij", apud „Car Simeon".

Kiam ni eniris la korton, aliaj policistoj, vicigitaj laŭlonge de la korto (eble 20 personoj), komencis frap-frape de mano al mano bate puŝi nin al la fundo de la policeja korto. Kompreneble, ĉe tia surpriza situacio, en la fina parto de la polica procedo ni, kiel esprimas sin la boksaj sportistoj, jam estis en stato „grogi", t. e. plene senfortigitaj. Ĝis la vespero la policejo svarmis de samsortuloj. Ni pasigis la tutan nokton en la policejo kaj frumatene komenciĝis la konata procedo: legitimado, kie vi laboras, kiomfoje vi estis en la policejo, ĉu vi estas esperantisto, abstinulo, membro de NRPS (la revoluciaj sindikatoj) k. a. (Sekvis registrado kaj fine oni liberigis ĉiujn arestitojn.)

La sekvan tagon dum labordeĵoro Koljo demandis min: „Borka, hieraŭ vi estis bonŝanculo, ĉu ne?" — „Jes — mi respondis, — estis vera spektaklo."

Mian foreston oni aranĝis kaj tiamaniere mia aresto estis kaŝita por la momento. La entreprena gvidantaro ne eksciis pri ĝi.

Post kelka tempo Koljo denove ŝercis. „Nu, Borka, ĉu vi ne elpensis ion en la policejo, ĉar ĉe simila okazo mi ĉiam faras ion!" „Ne, mi ne kapablas verki poezion kiel vi, sed, kion diri, mi elpensetis ion — en formo de inventaĵeto." „Kion?" „Ventoflirtigilon, kiun vi vidos funkcianta venontjare, ĝuste ĉe la Uuna de Majo." Tute seriozaspekta, Koljo ŝultrofrapis min, aldonante: „Vi havas sufiĉe da tempo, mi ege fidas al vi, bone konstruu vian ventoflirtigilon!".

Venis la promesita tempo! La 30a de aprilo 1937 j. estis sabato. Mi deĵoris ĉi-nokte ĉe la vaporkaldronoj. La fero-betona kamentubo (52 metrojn alta) staris muta. La ruĝa flago, bone prikudrita, kun fortika stangeto kaj la necesa kupra drato por ĝin fiksi estis pretaj. La dua horo meznokte. Mi konstatis, ke mia helpanto baj Georgi ronkas; ronkas eble ankaŭ la maljuna policisto ĉe la malproksima enirpordo de la Sofia Buĉejo. La vetero estis ege favora — agrabla senluna nokto. La supreniro de pli ol 120 ŝtupoj de tiu alta kamentubo por sana, forta junulo estis nek danĝera, nek malfacila afero.

Mi alligis la flagon kaj ĝi tuj ekflirtis, ja la maja venteto kvazaŭ helpe funkciigis mian „ventoflirtigilon". Tuj post la malsupreniro la unua zorgo estis ĵeti la ledajn gantojn en la fornegon. Poste ordigi ion alian kaj konstati, ke baj Georgi kiel novnaskito daŭre ritme ronketas.

Mi ankaŭ kuŝiĝis sur la seĝo ĉe la skribotablo. Sed ĉu vi kredas pri ebleco de dormo aŭ sonĝado?!

La ruĝa krepusko estis neordinare bela. Mateniĝis, ĉiuj maŝineroj funkciis plenorde;

# Heroa pasinteco

*La 12an de decembro 1979 en Sofio okazis celebro de la 65a naskiĝtago de la elstara kontraŭfaŝisma batalantino Penka Miĥajlova — arda esperantistino. Ĉe la celebro rakontis rememorojn pri Miĥajlova ankaŭ Trajana Petkova, honora membro de BEA. Jen ŝiaj rememoroj.*

## LA NEFORGESEBLA PENKA MIĤAJLOVA

K-dinon Penka Miĥajlova mi konas de 1937 j. Gentile kaj agrable ridetanta konduktorino kaj arda esperantistino. Neforgeseblaj estas niaj ekskursetoj al monto Vitoŝa. Penka ĉiam estis la animo de kantoj kaj ludoj. Pro ŝia gaja karaktero ĉiuj tre ŝatis ŝin. Sed Penka povis altiri la homojn ne nur al kantoj kaj ludoj, sed ankaŭ al batalo. Ŝi aktive partoprenis la batalojn de la tramlaboristoj.

Faŝista Germanio inside atakis Sovetunion. Komenciĝis milito — senindulga, kruela. Imitante la germanan hitleristan registaron kaj sub ĝia gvido ankaŭ la bulgara registaro komencis persekuti la honestajn popolamajn homojn. Pli kaj pli forta fariĝis la batalo de la bulgara popolo defende al la frata Sovetunio.

Jam en julio 1941 la monarkofaŝisma registaro organizis koncentrejojn por antifaŝistoj. En unu el la unuaj grupoj ĝi sendis ankaŭ Penka-n en la fifama koncentrejo Enikjoj (Krâsto Pole), apud Ksanti. Poste laŭ ordono de gestapanoj oni dividis virojn kaj virinojn — la virinojn sendis al koncentrejo „Sveti Nikola" proksime al Asenovgrad.

Fine de marto 1942 post la granda malsukceso de CK de Bulgara Komunista Partio ni, 12 virinoj, estis arestitaj kaj ankaŭ senditaj al „Sveti Nikola". Inter la 30 virinoj, kiujn ni trafis tie, estis ankaŭ Penka Miĥajlova.

La vivo en la koncentrejo estis peza. Malbonaj loĝkondiĉoj, malbona nutraĵo, izoliteco disde proksimuloj kaj batalo, ĉirkaŭbaritaj de policanoj kaj hundoj, senigitaj je korespondaĵo kaj intervidiĝoj. Tiel ni vivis.



---

la pumpiloj zumis, la manometroj montris normalan vaporpremon. Eble estis jam la sesa horo, do la deĵorfino. Subite ventoŝtorme (neordinare por lia aĝo) la maljuna policisto Mladen ekfuriozis: „Knaboj, kion vi faris dumnokte? Nun oni pendigos min kaj vin ambaŭ." Kompreneble, mi kaj des pli baj Georgi estis tute mirigitaj: „Sed kio, kio okazis, ni nenion scias!"

La pia baj Georgi nur krucsignis nesciante kion fari. Li ripetadis: „Dio mia, dio mia, bone, ke ni ne estas farintaj tiun krimecan agon!"

Tuj poste ili arestis min kaj mian helpanton, kondukis nin al la policejo de Poduene (bone, ke ne sur strato „Sofronij"). Tuj komenciĝis la policesploro. Mia tezo estis fortika: mi kaj mia helpanto laboris interne de la kaldronejo, neniu komisiis min gardi la kamentubon. Baj Georgi absolute en la sama senco povis respondi. Ja miaj ledaj gantoj estis jam netroveblaj. Nenia atestanto troviĝus kontraŭ mi. La longa turmentado ne donis rezulton.

Intertempe ĉe la kamentubo amasiĝis specialistoj policistoj, kiuj faris diversajn esplorojn. Oni fotis la ferajn ŝtupojn, mezuris la piedsignojn ĉe la muroj k.t.p.

Kiam oni rekondukis nin al la kamentubo, la flago daŭre flirtis pro la freŝa maja venteto. Mi apenaŭ sindetenis de kontento, ke la polico plene fiaskas pro manko de argumentoj. Gis tagmezo neniu policisto kuraĝis supreniri kaj demeti la flagon.

La ĉefpolicisto, ekster sia normala sinteno, ordonis al mi suprengrimpi kaj forĵeti tiun malbenitan ruĝan flagon. Memkompreneble, mi rifuzis, ĉar mi ne kapablas fari tion, mi ne povas riski mian vivon — estis la firma respondo.

Fine oni venigis fajro-brigadon de Zaĥarĉuk, kiu disponis specialajn sekurighokojn por grimpado ĉe similaj okazoj kaj la flago estis demetita.

Pasis tempo, eble semajnoj. La komentoj ĉe la laboristoj estis ĝojaj, kuraĝigaj. Foje Koljo karese ŝultrofrapis (kiel kutime) min: „Ha, Borka, ja la maja spektaklo estis bonege efika! La ventoflirtigilo bone funkciis, la polico kvazaŭ sovaĝiĝis!" En si mem mi pensis: „Estu benata, baj Georgi, kaj la ledaj gantoj."

Estis glora tempo. Post jaroj Vapcarov laboris en alia entrepreno. Sed ni ofte renkontiĝis, ĉar ni ambaŭ membris en la Societo de Bulgaraj Teknikistoj, kie li estis sekretario de la maŝinfakuloj.

Estu malbenita la polico, kiu konfiskis la plej karan donacon de Vapcarov al mi — aŭtografon sur la titolpaĝo de „Motorni pesni"*.

**Boris SIMEONOV**

*„Motorni pesni" (Motoraj kantoj) — poezikolekto de Nikola Vapcarov.

Ĉe tiuj pezaj kondiĉoj ni devis konservi nian vivon kaj sanon, nian spiriton. La funkciantaj partia kaj junkomunista organizoj subtenis nian rezistemon, nian pluan deziron vivi kaj batali.

Tra tiu ĉi koncentrejo trapasis pli ol 150 virinoj — junaj kaj maljunaj, de la 62-jara Nastja Isakova ĝis la 12-jara Zagorka.

Penka Miĥajlova, ĉiam sociema kaj helpema, kun firmaj komunismaj konceptoj, konvinkita pri la venko de la socialismo, lasis neforgeseblajn rememorojn ĉe ĉiuj kamaradinoj, kiuj konis ŝin.

Mi rememoras — estis merkredo, la 21a de junio 1942. Ĉe ŝanĝo de la gardostarantaj policanoj tri el niaj kamaradinoj — Mara Petljakova, Jordanka Nikolova kaj Liljana Dimitrova — sukcesis fuĝi. Ili triope loĝis en ĉambro 1. Penka Miĥajlova kaj Zlatka Ĉernokoleva estis deĵorantaj laŭ ĉambroj. Antaŭ la vespera kontrolo ili raportis al la serĝento, ke tri virinoj forestas. Tuj la policanoj kaptis la deĵorantinojn. La alveninta agento sendis ilin al la regiona policejo, de kie ili revenis duonvivaj pro torturado.

Ĉiujn oni devigis konstrui ŝoseon tra la montaro. Ankaŭ ĉi tie Penka distingiĝis. Ŝi atente zorgis, ke neniu malforta kamaradino fosu per la peza pikpioĉo aŭ transportu grundon kaj ŝtonojn per la ligna manportilo. Penka forpuŝadis tian kamaradinon kaj okupadis ŝian lokon.

Laŭvice (laŭ listo) ni alportadis akvon por la kuirejo. Penka plenumadis ne nur sian devigon, sed ankaŭ ĉiam 2—3-foje alportadis akvon per la pezaj feraj gemeloj, notante sur la listo, ke la akvo estas alportita de malfortaj, malsanaj aŭ tre aĝaj kamaradinoj.

Mi devas diri, ke en la koncentrejo ĉiuj junaj kamaradinoj rilatis kun amo kaj estimo al la plenaĝaj. Ili portis akvon kaj por lavado, kaj por banado. Penka kaj Kalina Radulova estis regulaj akvoportantoj. Du grupoj de junaj virinoj kolektis kaj altrenis aŭ dorse portis ankaŭ lignon por hejtado. Penka libervole laboris e ambaŭ grupoj. Kreskinta en multmembra laborema familio, ŝi havis forte evoluintan socialan senton.

Juna, saĝa, kvieta, ĉiam ridetanta, sciama, ŝi estis bonega kamaradino. Dotita per sento pri rimo kaj ritmo, kun kritika gusto, ŝi per versoj priridis mankojn kaj erarojn — proprajn aŭ de siaj kunulinoj.

Tiu ĉi suna junulino, tiu ĉi kuraĝa batalantino por socialismo pereis martire. Falinte kiel partizanino en la manojn de la policanoj, ŝi estis barbare torturata. Oni rompis al ŝi la krurojn, detranĉis unu manon, la orelojn, la mamojn, enterigis ŝin duonviva. . .

Ĝis la lasta spiro Penka Miĥajlova restis fidela al sia amo al libero kaj socialismo, al sia Komunista Partio, al sia popolo.

**Trajana PETKOV**

# TRA LA E.MONDO

## *„LIRO—79" en USSR*

*Pasintjare la tradicia renkontiĝo de la volgo-uralaj e-istoj «Liro—79» okazis denove en u. Miass. La loka E-klubo «Malaĥita Stelo» gastigis 72 partoprenantojn el 9 urboj. La renkontiĝo okazis apud la bela lago Ĉebarkulj.*

*Ĉefa temo — la 120a datreveno de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof. Prelegis Tatjana Koptjagina. Kelkaj programeroj estis dediĉitaj al la Jaro de la Infano. Okazis seminario de klubaktivuloj, kiun gvidis Boris Kolker, membro de la estraro de Asocio de Sovetaj E-istoj (ASE). Li rakontis ankaŭ pri la UK en Lucerno, projekciis diapozitivojn pri ĝi kaj pri Svislando.*

*Kelkaj E-kluboj prezentis filmojn pri «Liro—78» kaj pri la someraj tutlandaj E-aranĝoj. La miassa E-klubo aranĝis fotoekspozicion pri «Liro—78», prezentis fotoalbumojn pri la kvinjara klubagado kaj albumojn kun priesperantaj artikoloj el la gazetaro.*

*La koncerton partoprenis la mastroj kaj la gastoj. Ĉefan parton de la programo prezentis laŭreatoj de «Liro—78».*

*Okazis ankaŭ interkona horo, kantostudoj, komuna fotado, societaj ludoj, dancoj, promenado en freŝa vintra aero. Funkciis E-butiko. Oni povis aĉeti E-librojn, insignojn, emblemojn.*

*Sed la plej grava aranĝo estis la poezia konkurso «Liro—79». Ĝin partoprenis pli ol 20 personoj el 8 urboj.*

*La konkurso konsistis el 4 branĉoj:*

*1. Plenumo de E-kantoj; 2. Recitado de versoj; 3. Tradukitaj kantotekstoj; 4. Originalaj melodioj por E-kantotekstoj.*

*La gajnintoj ricevis memorajojn kaj diplomojn.*

*La renknotiĝo bone impresis kaj inspiris ĉiujn partoprenintojn al pli aktiva laboro sur la E-kampo.*

T. Koptjagina

## ESPERANTISTA SOCIETO DE KUBO

En Kubo sub la protekto de la Akademio de Sciencoj estas fondita Esperantista Societo. Ĝia agado komenciĝis en la tuta lando.

Ĉefaj celoj de la societo:

1. Kontribui al kompreniĝo kaj kunlaboro inter la popoloj de la tuta mondo per la internacia lingvo E-o, sen neglekto de la naciaj lingvoj.
2. Efektivigi organizajn formojn en nacia skalo (rondojn en entreprenoj, lernejoj ka.) je komunuma, distrikta kaj nacia niveloj.
3. Organizi instruadon de E-o en ĉeestaj kaj forestaj kursoj ĉe la E-societoj, kiuj funkcias en la tuta lando.
4. Efektivigi ligojn kun la ceteraj organizacioj en Kubo kaj kun parencaj organizacioj en la tuta mondo.

Baldaŭ la E-Societo de Kubo malfermos sian sidejon en la Akademio de Sciencoj de Kubo en Habano.

Direkcia konsilantaro: inĝ. Andres Rodriges, vicprezidanto d-ro Rene Valdes, sekretarioj: pri internaciaj ligoj d-ro Serafin Marero, organiza Rufino Lopes, pri financoj Fernandes Paredes, pri kulturo d-ro Barbara Onja, pri instruado Hulio Martines, pri propagando Roberto Gutri.

***Adreso: Esperanto-societo de Kubo, poŝtkesto 314, Habano 1, Kubo.***



# INTER GEFRATOJ

*Ĉiu bulgaro revas viziti Sovetunion — la landon de la frata soveta popolo, la landon de la konstruata komunismo. Mi ankaŭ revis. Kaj en decembro pasintjare mia revo tute subite efektiviĝis: mi estis invitita labori du semajnojn inter la e-istoj de Leningrado.*

*La oficiala invito trafis min en strečega periodo — multaj laboroj estis urĝe farendaj tie ĉi, en Sofio, kie mi loĝas. Sed ĉu mi povis heziti? Tagnokte mi laboregis por fini ĉion, kaj la 13an de decembro la potenca stala birdo „TU — 154" forportis min norden. Nur post tri horoj la birdo surteriĝis en la fama Lenin-urbo.*

*Ĉu mi povus en mallonga raportaĵeto rakonti pri ĉio vidita, travivita kaj farita en Leningrado? Certe ne. Nur pri parteto el ĉio.*

*Unue — pri la plej grava: la E-laboro, pro kiu mi venis. Dum la mallonga tempo de mia restado en Leningrado mi gvidis du kursojn — unu elementan kaj alian por lingva refreŝigo kaj metodiko de la E-instruado. En ĉiu grupo partoprenis po ĉ. 20 personoj. La lecionoj okazis ĉiutage (escepte sabaton kaj dimanĉon) en la Domo de Paco kaj Amikeco ĉe Fontanka.*

*Mi havis la eblecon ankaŭ propagandi E-on. En la Centra Lekciejo mi parolis antaŭ pli ol 120-persona publiko pri la problemo de internacia lingvo kaj ties solvo per E-o. Rakontante pri la vivo kaj laboro de la bulgaraj e-istoj, mi substrekis ilian fortan deziron labori ĉiam pli intime kun la sovetaj e-istoj por konstrui kaj firmigi la solidarecon inter la laboruloj en la tuta mondo, kontribui al ties batalo por ĉesigo de la vetarmado, por aktiva internacia kultura interŝanĝo, por amikeco kaj kompreniĝo inter homoj kaj popoloj, por paco kaj socia progreso sur la tero. Pri la samo mi parolis ankaŭ en kunvenoj de neeistoj en la Domo de Paco kaj Amikeco kaj en la Palaco de l' Junularo.*

*Aparte neforgeseblaj restos por mi tri renkontiĝoj. La unua — kun la aktivuloj de la Leningrada E-klubo. Ĉeestis la renkontiĝon la plej maljuna E-veterano en Leningrado Semjon Podkaminer, homo de alta erudicio kaj riĉega sperto en la E-vivo kaj laboro, homo de ĉiuj estimata kaj amata; membroj de la kluba estraro — doc. Boris Stefanov, Neli Kublanova, Valerija Cvetkova, Lidija Belova k.a.; reprezentantoj de la Domo de Paco kaj Amikeco k-doj Smirnov kaj Volkov. Kiam oni levis la unuan toston, mi estis vere surprizita kaj profunde kortuŝita: oni gratulis min lige kun mia 60-jara naskiĝtago! Vere la dato estis la 15a de decembro. . . Troŝarĝita de novaj impresoj kaj travivaĵoj mi estis forgesinta tion. Sed tiuj ĉarmaj, atentemaj kaj amoplenaj sovetaj homoj kaj e-istoj ne estis forgesintaj. . .*

*La dua renkontiĝo estis kun la E-junularo de Leningrado kaj ĝia distrikto (el Tiĥvin kaj Vsevolojsk). Tio estis brila amuzvespero en Kulturdomo „S. M. Kirov", kie troviĝas ankaŭ la klubejo de la leningradaj e-istoj. Partoprenis la vesperon pli ol 100 gejunuloj kaj deko da plenaĝuloj. Mi kaj studento el GFR diris salutvortojn. Abundis humuro, spritaĵoj, kantoj, dancoj. Aparte brilis amiko Bronŝtejn el Tiĥvin — neelĉerpebla rilate al spritaĵoj kaj iniciatemo pri kolektivaj ludoj kaj amuzoj.*

*La tria renkontiĝo okazis en la loĝejo de mia kursano Gena kaj lia ĉarma edzineto Nataŝa. Li estas artisto kaj reĝisoro, ŝi — ĵurnalistino. En la loĝejo kolektiĝis deko da geamikoj, ĉiuj novaj e-istoj, talentaj artistoj kaj reĝisoroj el diversaj teatroj, kiuj jam vivas kun kuraĝaj planoj pri E-spektakloj en kaj ekster la lando. Oni ne povas ne admiri ĉi junajn homojn, decidintajn ankaŭ per la lingvo E-o krei estetikajn valorojn kaj batali por la triumfo de la plej noblaj ideoj de nia nuntempo. Mi plene kredas je la sukceso de ilia esperiga laboro. Nia renkontiĝo komenciĝis je la 15 kaj finiĝis je la . . . 24 horo! Ĉio tipe rusa estis en tiu vespero — kaj bongustaj „galuŝki", kaj diversaj hejme preparitaj frandaĵoj kaj trinkaĵoj, kaj la tradicia rusa gitaro, kaj multege da rusaj kantoj (ankaŭ en E-o, en bulgara, en tatara. . .), kaj la mirinda rusa larĝanimeco kaj gastamo. . . Gena, Saŝa, Oleg, Raŝid, Nataŝa, Kolja, ilia entuziasma E-instruisto Vitja, la ĉeestantaj miaj du kursaninoj Saŝa kaj Lena, la dommastrino — ĉiuj klopodis kontribui por laŭeble pli agrabla, plezuriga etoso. . . Mi estis ravita de ĉio en tiu ĉi neforgesebla vespero kun la homoj de la arto.*

*Ĉiutage mi havis strečan programon. Oni veturigis min al diversaj rimarkindaĵoj de Leningrado — unu el la plej belaj urboj ne nur en Sovetunio, sed ankaŭ en la tuta mondo.*

Instruante



*Ĝi situas en la fundo de la Finna Golfo, sur la bordoj de Neva (Granda kaj Malgranda), Nevka (Granda, Malgranda kaj Meza) kaj deko da aliaj malgrandaj riveroj (Fontanka, Mojka, Volkovka, Karpovka, Ĵdanovka, Smolenka, Granda Oĥta, Okervilj, Ĉornaja Reĉka ka.) kaj multaj kanaloj. Fondita en 1703 j. de Petro la Granda, la urbo estas nedisigeble ligita kun la historio de Rusio, kun la rusa kulturo, kun la rusa revolucia movado kaj la venko de Oktobro. Ĉi tie laboris kaj batalis tri revoluciaj generacioj. Ĉi tie laboris kaj batalis la granda Lenin — fondinto de la unua en la mondo socialisma ŝtato, instruanto kaj gvidanto de la tutmonda proletaro. Ĉi tie donis la senmortajn fruktojn de siaj talentoj kaj genioj verkistoj kaj poetoj kiel Krilov, Puŝkin, Lermontov, Gogolj, Belinskij, Nekrasov, Dobroljubov, Dostoevskij, Ĉerniŝevskij, Gorkij ka. la komponistoj Glinka, Rimski—Korsakov, Ŝostakoviĉ ka., la pentristoj Repin, Brodskij ka., la sciencistoj Lomonosov, Mendeleev, Pavlov, la grandaj armeestroj Suvorov kaj Kutuzov. En la brustojn de la heroaj gefiloj de Leningrado rompiĝis la ondoj de la hitleraj barbaroj dum la Patrolanda Milito (1941—45). La historio ne konas similan heroecon: 872 tagojn la malamiko sieĝis kaj blokis la urbon, ĵetis fajron kaj morton en ĝin, sed ĝi ne kapitulacis, ĝi eltenis . . .*

*Ĉio ĉi lasis ĉie, ĉe ĉiu paŝo, sennombrajn postsignojn. Leningrado estas urbo de riĉaj muzeoj kaj majestaj monumentoj de la historio kaj la homa kulturo, urbo de admirindaj arkitekturaj ensembloj, de imponaj palacoj, pontoj kaj parkoj. Ĝi estas urbo de la krea homa spirito, urbo de arto kaj beleco. Multaj semajnoj estas necesaj por vidi kaj kontempli, por travivi kaj asimili tiun belecon. . . Mi havis la feliĉon konatiĝi nur kun parteto de ĝi: la legenda krozŝipo „Avrora“ (Aŭroro), kiu donis la signalon por la revolucio, la Instituto Smolnij — rezidejo de la unua en la mondo socialisma registaro, la fortikaĵo Petropavlovskaja, la ermitaĝo — riĉega trezorejo de la tutmonda arto, la Rusa Muzeo, la Katedralo Isakievskaja, la Etnografia Muzeo de la Popoloj de USSR, la Nova Palaco de la Junularo, la frata Tombejo Peskarjovskoe, la muzeoj-domoj de Puŝkin, Dostoevskij, Ŝaljapin, Kirov. Oni veturigis min al la Lenin-lokoj en Sestroreck kaj Razliv, al la famaj palacoj en Petrodvorec, Puŝkin, Pavlovsk, al la malnova urbo Novgorod. . . Por mia dusemajna restado tio estis maksimuma. . . Pli ne eblis.*

*Leningrado estas lulilo de la soveta E-movado. Ĉi tie en 1921 estis fondita la Soveta E-Asocio. La urbo ankaŭ nun okupas unu el la gvidaj lokoj en la soveta E-movado. En ĝia klubo nun membras ĉ. 400 malnovaj kaj novaj e-istoj, plejparte junularo. Nun, post la fondo de Asocio de Sovetaj E-istoj (ASE) en marto 1979, oni vidas pliviglIĝon de la E-movado kaj pli grandan pretecon pri morala kaj materiala helpo fare de oficialaj organoj kaj instancoj, unualoke de Komsomolo, Sindikatoj kaj la societoj de amikeco kun eksterlando.*

*Mi forlasis la urbon de Lenin kun nova, pli forta amo al ĝi, havante la senton, ke mi modeste kontribuis por la antaŭenigo de la tiea E-movado, por la plua proksimiĝo kaj frata kunlaboro inter la bulgaraj kaj sovetaj e-istoj. Varman dankon mi portos ĉiam en la koro al ĉiuj leningradaj samideanoj, kiuj helpis min kaj mian laboron — gek-doj Podkaminer, Stefanov, Cvetkova, Kublanova, Belova, M. Smirnova. Apartan dankon al k-do Vjaĉeslav Volkov, kiu dediĉis plej multan tempon, zorgojn kaj atenton por fari mian restadon agrabla kaj mian laboron fruktodona.*

**Kunĉo Válev**

## E-GASTOJ EN SOĈI

En 1979 mi iĝis delegito de UEA, kaj tio alportis jam la unuajn fruktojn por nia E-klubo: interesajn renkontiĝojn kun alilandaj samideanoj. Plej fruktodona estis la aŭtuno: vizitis nin s-ano Petro de Smedt el Belgio kun sia edzino (japanino). Tio estis la plej malofta renkontiĝo por nia E-klubo, ĉar nin unuafoje vizitis tute „Esperanta familio“. Petro konatiĝis kun Kóto Hata dum la UK de E-o en Usono, poste ili geedziĝis. Kun ili ni vizitis la konatan en urbo Soĉi „Arbon de l'Amikeco“, sur kies branĉoj estas pli ol 500 citrusaj greftoj, faritaj de homoj el plej diversaj landoj de la mondo. La greftojn faris kaj ŝtatestroj, kaj eminentaj profesoroj, kaj kosmonaŭtoj. Ankaŭ 6 e-istoj greftis burĝonojn sur la Arbo de l'Amikeco — pri tio atestas 6 ŝildetoj sur la branĉoj.

Post vizito de la Arbo ni rigardis ankaŭ ĉirkaŭaĵojn de la urbo kaj eĉ grimpis sur monton. Sed plej bona travivaĵo (laŭ de Smedt) estis la renkontiĝo kun la lokaj e-istoj en tea salono, kie en amika atmosfero fluis agrabla lanta interparolo.

Kelkajn tagojn poste ni havis renkontiĝon kun familio el Norvegio: Kristina kaj Per Engen (fervojestro el urbo Bergen).

Samtempe venis samideano el Usono. Mi, mia najbaro kaj mia 6-jara filineto Larisa, denaska e-istino, renkontiĝis kun li kaj pasigis kune kelkajn horojn. Poste mi kondukis lin al familio Engen — okazis neforgesebla renkontiĝo de e-istoj el tri landoj.

Post kelka tempo aŭdiĝis sin la finna s-ano Asko kun sia edzino. Denove vizito al la Arbo de l'Amikeco, akvofaloj, parkoj, teatro, stereokino k.a.

La apero de mia adreso en la Jarlibro de UEA malfermis pordon de nia E-klubo por multaj samideanoj el plej diversaj landoj. Nun ni atendas pluajn vizitojn kaj leterojn de samideanoj, kiuj deziras veni al nia urbo, viziti nin. Al ĉiuj ni diras: „Bonvolu! Ni kun sincera ĝojo renkontos vin!“

Nia komuna adreso:
Esperanto-klubo, p. k. 6, 354000 Soĉi — centro, USSR.

**Vladimir Bespalov**

# INDE PREZENTIS SIAN LANDON

## PRI LA VIZITO DE RAJNA KONSTANTINOVA EN BRITUJO

### INTENSAJ E-KURSOJ EN WEDGWOOD MEMORIAL COLLEGE, BARLASTON, STOKE-ON-TRENT

Tiuj ĉiujaraj E-kursoj estas akceptitaj kiel altnivelaj, seriozaj kaj vere laborigaj, postulantaj iom da intelekta rigoro en kvazaŭ universitata etoso. Post 19 jaroj ili, apenaŭ, havas ian prestiĝon. Samtempe la gvidantoj celas kamaradecan, amikan etoson, tiel ke la seriozaj intelektaj laboroj estu ankaŭ plezuraj kaj ke nespertaj e-istoj gajnu memfidon kaj ne sentu sin ĝenataj.

Mi povas nun raporti, ke s-ino R. Konstantinova modele plenumis la devojn de kolegino en la Barlastonaj kursoj.

La tri formalaj prelegoj, kiujn ŝi prezentis, vere estis altnivelaj; ili evidentigis tre konsciencan kaj inteligentan preparadon, estis prezentitaj kun multe da konsidero pri la aŭdantaro kaj vere vekis intereson. Pri la suferoj de la bulgara popolo kaj pri la nuntempa multe pli bona situacio ŝi prelegis vere elokvente kaj konvinke, tiel ke pluraj el la aŭskultantoj eĉ eklarmis. Diversaj kursanoj poste komentis, ke ili nun havas tute novan bildon pri Bulgario kaj multan simpation al ĝia popolo. Ŝia prezentado pri Ivan Vazov estus inda kiel enkonduko eĉ en universitatan kurson kaj vekis multan intereson pri la aŭtoro, kies verkoj restas en Britujo preskaŭ nekonataj (escepte inter e-istoj). Tradukitajn de Simeon M. Simeonov poemojn ŝi prezentis tre kortuŝe. Ŝia prelego pri la Infana Asembleo, pri kiu informoj en Britujo verŝajne ne estis adekvataj, vekis multan intereson kaj ĝeneralan bedaŭron, ke Britujo ne sendis reprezentantojn. La informoj pri la nuntempaj zorgoj en Bulgario pri patrinoj kaj infanoj vekis novan respekton. Konstantinova devis respondi al multaj demandoj, kaj la respondoj ĉiam indikis bonan nivelon de prepariteco.

Estus nerealisme ne konstati, ke inter la vivostiloj kaj regantaj ideologioj de niaj du landoj ekzistas diferencoj, kiuj ebligus diversajn miskomprenojn. Mi opinias, ke la prelegoj de s-ino Konstantinova faris ion por krei novan intereson kaj simpation al Bulgario kaj forigi kelkajn misinformojn. Estis tamen ankaŭ bone, ke dum la tuta kursaro ŝi konstante montris takton, ĝentilecon al la gastiganta lando kaj amikecan rilaton al sia aŭskultantaro. Per la modereco de sia sinteno kaj per ekvilibra takto, kiu estis vere diplomateca, ŝi restis en tre bona rilato kun ĉiuj kursanoj. Ankaŭ per tiel altciviliza kaj diskreta stilo ŝi tre bone reprezentis sian landon kaj faris tre bonan impreson.

Oni faris al ŝi de tempo al tempo multajn demandojn pri la E-movado en Bulgario. Ankau pri tio ŝi faris tre bonan impreson, sed, eble pli valore, mem donis ekzemplon pri la nivelo de esperantista kompetenteco inter la bulgaroj; multaj komentis pri la beleco kaj klareco de ŝia parolmaniero, ŝia elokventeco, ŝia scio kaj ankaŭ ŝia videbla servemo kaj helpemo.

En formale programitaj Konversaciaj Rondoj, ankaŭ en multaj ĉetablaj kaj aliaj neformalaj konversacioj s-ino Konstantinova (spite al natura nervozeco kaj malhelpoj de ŝia ne tre bona sanstato) konstante montris sin tre afabla kaj pedagogie inteligenta, kuraĝigis la nespertajn paroli Esperante, montris simpation kaj intereson al ĉiuj kursanoj kaj multe kontribuis al la agrabla, amikeca intereso de la kursanaro. Mi volas aparte mencii ŝian specialan afablecon al la tri blindaj studentoj, kiuj multe amikiĝis kun ŝi.

Estas mia serioze pripensita opinio, ke dum la kursoj en Barlastono s-ino Konstantinova postlasis vere bonan impreson pri nuntempa Bulgario, pri la Bulgara E-Asocio, kaj ankaŭ pri si mem kiel e-isto kaj kiel homo. Mi trovis ŝin modela kolegino, tre taŭga por tiaj kursoj. Se ŝia sanstato ne tro grave malboniĝos, kaj se ni povos iel venki la multajn administraciajn kaj financajn malfacilajojn, ni tre volonte havos ŝin denove kiel nian eksterlandan gast-kolegino, post intervalo de du aŭ tri jaroj. Mi kredas, ke nun ŝia nomo en la programo allogus la kursanojn; kaj ŝi estas kolegino, kun kiu mi tre facile kaj plezure kunlaboras.

S-ino Konstantinova tre laboris antaŭ kaj dum la barlastonaj kursoj, kaj mi penis ne tro streĉi ŝin ekster ili, sed aranĝi por ŝi interesan libertempon. Tamen mia impreso estas, ke dum plezura turismo ŝi konscie kaj konscience ankaŭ akumulis stokon da impresoj, kiuj poste estos kulture valoraj kaj espereble iam utilaj por la E-laboro en la propra lando.

Ŝi kaj mi kune faris programon rilatan al la Jaro de la Infano en Southampton, kaj mia impreso estis, ke ĝi bone sukcesis. Laŭ nuntempaj britaj kriterioj la aŭskultantaro estis sufiĉe granda.

Ŝi ankaŭ parolis tre interese, precipe pri temoj de la socia progreso en Bulgario, al kunveno de la E-societo en Oxford.

Kvankam mi ne sukcesis interesigi la gazetaron tiel multe, kiel mi deziris, okazis bona intervjuo ĉe radio Stoke-on-Trent, aperis bildo pri la kursoj en la loka ĵurnalo, kaj raporto en la lokaj ĵurnaloj en Southampton. Ni kaptis multajn okazojn por iom propagandi Esperanton; la flueco kaj natureco de ŝia konversacio ofte faris tre bonan impreson.

Entute mi opinias, ke la vizito de s-ino Rajna Konstantinova tre bone sukcesis. Ŝi ĝenerale postlasis bonan impreson kaj ĉarme, takte kaj inteligente reprezentis sian landon.

D-RINO MARJORIE BOULTON
el la Akademio de Esperanto

## KONCIZE

**Moskva Internacia E-klubo informas, ke ĉe ĝi fondiĝis filatelista sekcio, kiu nomiĝas Moskva Filatelista Klubo „Esperanto". Ĝia statuto estas aprobita de Tutsoveta Filatelista Asocio.**

**La ĉefaj taskoj de la klubo estas: pere de la filatelo firmigi la interpopolan amikecon, disvastigi Esperanton.**

**La klubanoj deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri la temoj: „Esperanto kaj filatelo", „Internaciaj organizaĵoj", „Internacia kunlaboro" ka.**

**Korespondadreso: USSR, Moskvo 113525, str. Mal. Dnepropetrovskaja 3-3-139, Mordoĥoviĉ Isaak.**

**V. Zibenkes**

*

En Latvio aperis libro „Esperanto" de E. Janvalks kaj A. Gutmanis.

En la libro estas gramatiko, E-latva kaj latva-Esperanta vortaroj. Estas donita ankaŭ la „Plena gramatiko de Esperanto" de Zamenhof. La libro havas 577 paĝojn. Eldonkvanto 10 000.

*Fine de aprilo nia E-klubo de Internacia Amikeco aranĝos grandan pripacan ekspozicion, kies materialoj estos ricevitaj nur pere de E-o.*

*Ni petas la e-istojn el tutmondo helpi nin por la realigo de tiu ĉi grava iniciato, sendante konvenajn materialojn (salutleterojn, ĉiulingvajn afiŝojn, flugfoliojn, revuojn, ĵurnalojn, libretojn, desegnajojn, fotojn pri pacmanifestacioj ktp. Ni nepre respondos al ĉiu!*

*Nia adreso: USSR 626440 Tjumenskaja oblast. Nijnevartovsk. Omskaja 12, k. 3, kamarado Suvatev T. D.*




## KIEL MI ESTIĜIS ESPERANTISTO

Mi estas Emil Petkov, 12-jara lernanto en la VI klaso de la fundamenta lernejo en v. Borovo, distrikto Ruse, Bulgario. Mia patrino Ganka estas instruistino en la urbo Vjatovo, ankaŭ e-istino. Mia avo Marin Bârdarov, jam tre aĝa, estas malnova e-isto. Kial mi, juna lernanto, ne estiĝu e-isto?

Mi trovis malnovan lernolibron de Asen Grigorov kaj komencis sola lerni E-on. Nun mi finlernis ĉiujn lecionojn de la lernolibro.

Foje, kiam mi pasis preter la vilaĝa E-klubejo, mi vidis en ĝi gevirojn. Mi kuraĝis eniri. En la klubejo la instruisto Ivan Neĉev instruis E-on. La kursanoj estis ĉirkaŭ 20. La instruisto invitis min sidiĝi. Mi tuj faris tion kaj atente aŭskultis ĝis la fino de la instruhoro. Tiam mi diris al la instruisto, ke ankaŭ mi lernas E-on. Li ekĝojis kaj demandis min, kiu kaj de kie mi estas, kiamaniere mi lernas E-on k t p. Mi respondis pri ĉio. Komenciĝis inter ni ordinara E-konversacio.

Fine la instruisto invitis min regule viziitadi la kurson. Bedaŭrinde, mi ne povis fari tion, ĉar la lecionoj okazis vespere, kiam mi devis prepari min por la lernejo. Malgraŭ tio mi estiĝis amiko de k-do Neĉev, kaj li ofte helpas min en la lernado de E-o.

**Emil Petkov**

### VARIA SILVESTRA BALO EN BUDAPEŜTO

Dum Novjara Silvestra Balo enkadre de la tradicia Vintra Esperantista Ferio en Budapeŝto aparte impresis la demonstro de du popolaj kutimoj.

La bulgara E-grupo, konsistanta el 25 gejunuloj, partoprenis aktive la aranĝon. Ĝi iniciatis kaj demonstris la bulgaran popolan kutimon „survakane" je la Novjaro mem. Sur la salona scenejo Kornelija Boneva el u. Vidin frapetis per „survaknica" (speciale ornamita kornusbranĉeto) la dorsojn de reprezentantoj de la ĉeestantaj e-istoj el 17 landoj kaj gratulis ilin, bondezirante sanon kaj feliĉon. Poste la grupgvidantino Vasja Petrova recitis la versaĵon „Esperantista geedziĝo" de Raymond Schwarz (Rajmond Ŝvarc). Ĉio ĉi okazis je la 23 horo laŭ hungara tempo, egala al la 24 horo laŭ la bulgara.

Venis la hungara kutimo. Hungara samideano enportis en la salonon vivan porkidon kaj ĉiuj estis invititaj tiri ĝin je la vosto. . . por esti sanaj, riĉaj, kaj feliĉaj. . . Nova eksplodo de rido, gajaj krioj. Ĉio ĉi aparte variigis la balon.

E. G.

### *LA INTERNACIA E-MUZEO EN VIENO 50-JARA*

La 22an de septembro 1979 oni solene celebris la 50-jariĝon de la Internacia E-muzeo en Vieno (IEMW). Krom aŭstraj e-istoj partoprenis ankaŭ gastoj el Belgio, Bulgario, Italio, Svedio.

La celebro komenciĝis per vizito al la tombo de la fondinto de IEMW — kortega konsilanto Hugo Ŝtajner (Steiner). La direktoro de la muzeo d-ro Walter Hube kaj lia kunlaboranto Herbert März prezentis grandan florkronon kun verdaj bantoj kaj surskribo „Al eterna memoro — Internacia Esperanto-Muzeo". D-ro Hube skizis en mallonga parolado la vivovojon de H. Steiner.

Posttagmeze okazis ĝenerala kunveno de la muzea societo kun elekto de estraro. Post mallonga promenado tra la urbo sekvis festvespero en la Pola Instituto, kie en siaj salutvortoj la vicdirektoro de la instituto atentigis pri la bona rilato al E-o en Pollando. Oni tralegis gratulleterojn el multaj E-organizaĵoj kaj unuopaj e-istoj el la tuta mondo.

D-ro Hube faris festparoladon pri la fondo kaj la plua evoluo de IEMW.

Projekciado de du filmoj finigis la programon. Sekvis koktelo, en kiu d-ro Boris Nedkov — direktoro de la Bulgara E-Muzeo, transdonis la salutojn de BEA.

**Laŭ „Informilo de IEMW" n/ro 4/1979**

*Ljudmila Jevsejeva*

### KURAĜA ANSERO

**Ga-ga! — diras la ansero. —**
**Kvankam neĝas sur la tero,**
**mi, sen botoj, lagon iras,**
**ĉiuj knaboj min admiras:**
**„Tiu birdo — sensacio!**
**Nudpiedas sur glacio. . ."**

### *SILAB-ENIGMO*

**Silaboj:** a — a — ad — am — ĉi — fi — fin — ĝo — ĝo — ĝas — in — ju — ko — ku — li — me — mi — ne — ne — ni — per — ra — ri — sa — su — te — ti — ti — var — zu.

| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | | | | | | |
| | | | | | | | | | | | |

Dekstren: 1. En tia kvanto, kia estas bezona (infinitivo).
3. Ĉiam verda arbeto el familio koniferoj, kies beroj estas uzataj por aromigi brandon (radiko).
5. Eniro en grupon, societon, kongreson.
7. Regule pagi al societo (imperativo).
9. Iĝi varma (prezenco).
11. Firmeco de la koro antaŭ danĝero.

Maldekstren: 2. Laste, ĉe la fino de la fino (tempe).
4. Adverbo signifanta „en neniu ajn tempo".
6. Arbo, kies florojn oni uzas por fari aroman teon (adjektivo).
8. Profunde amika rilato (adverbo).
10. Esti ravita de beleco.
12. Ebena tegmento kun balustrado (adjektivo)

Post korekta solvo de la enigmo vi tralegos sur la malsupra linio proverbon de L. L. Zamenhof.

**Marin Băcev**

# Delando al lando

BELGIO. E-istoj donacis pli ol 320 000 belgajn frankojn por elekti en la urbocentro de Antverpeno grandan domon, kiu taŭgos por klubejo kaj por la grafika centro de UEA.

BRAZILO. Aperas ĉiusabata E-rubriko en la brazila jurnalo „Luta Demokratica".

BRITLANDO. Apud Londono ekfunkciis nova E-centro Hillingdon, 46 Les Crescent, Ruislip Gardens, Middax, HA4 6PP, Britlando.

FRANCIO. Unuiĝo Franca por E-o okaze de sia jarkongreso en majo en Lille aldonis al sia statuto specialan paragrafon pri la Homaj Rajtoj. Pro la principoj de justeco kaj frateco inter ĉiuj homoj, kiujn ĝi aprobas, UFE solidariĝas kun la Univ. Deklaracio pri la Homaj Rajtoj. La agado de la asocio celas interalie la forigon de ĉia lingva diskriminacio kaj de ĉiaj komunikaj baroj. UFE konsideras, ke E-o estas la nura neŭtrala kaj racia solvo por atingi ĉi tiujn celojn. Rajto je lingva egaleco, rajto je digno kaj je nediskriminacio en la homa komunikado estas „HomajRajtoj".

En siaj priprofesiaj paĝoj la francaj oficialaj telefon-libroj disponas pri rubriko „Professeurs d'ésperanto". Lastaj eldonoj jam enhavas tiurilatajn informojn.

IRANO. Meze de junio aperis en Teherano unu plia verko pri E-o en la persa lingvo — „Morgaŭiĝo de la hodiaŭo". Temas pri longa intervjuo (183 paĝoj) de jurnalisto kun d-ro Saheb-Zamani. Li analizas E-on el psikologia, sociologia kaj lingvistika vidpunktoj.

D-ro Saheb gvidas nun komisionon, kiu reverkas la sociologiajn librojn por la mezlernejoj: li akceptis la respondecon por enŝovi la ideon pri E-o en la partojn pri lingvo kaj kulturo. Li havas bonajn rilatojn kun la nunaj estroj kaj ties rondoj kaj laŭ li la nuna situacio pli favoras por E-o ol la antaŭa. La gefiloj de ajattulah Ĥomejni kaj la plej aĝa filo de ajattulah Ŝaraiatmadari estis inter la unuaj E-gelernantoj de d-ro Saheb.

SOVETUNIO. Post la naskiĝo de ASE la E-veterano S. N. Podkaminer el Leningrado estis komisiita fondi tutsovetan nacian MEM-sekcion.

Post internaciaj kontaktoj ekaktivis E-teatro en Lenigrado dank' al S. Podkaminer kaj talentaj junaj aktoroj Oleg Popkov kaj Raŝid Ĥajrullin.

ARGENTINO. Unua Tut-Amerika E-Kongreso okazos je la 12—15. 7. 1980 en urbo San Luis, Argentino. Amerikanoj kaj neamerikanoj estas kore invititaj. La organizantoj entreprenis la starigon de aktuala impona ekspozicio por elmontri la eĥon de ĉi tiu evento tutmonde. Tial la e-istoj de la tuta mondo estas petataj de nun sendi salutojn al la kongreso, preferinde per poŝtkartoj. Libroj, revuoj, bultenoj en E-o estos bonvenaj, precipe se ĉi-lastaj enhavas anoncojn pri ĉi tiu kongreso. Adreso: la Tut-Amerika Esperanto-Kongreso — Casilla Correo Central 289—2000 Rosario, Argentino.

(Daŭrigo s. r p. IV)

## SOMERA E-TENDARO EN LANĈOV ĈSSR

En 1980 la 28a Somera E-Tendaro okazos apud vilaĝo Lanĉov ĉe barajlago de Vranov en tri etapoj: unua etapo — 29. VI—12. VII — junulara; dua etapo — 13. VII—26. VII; tria etapo — 27. VII—9. VIII.

Ĉiutage krom dimanĉo okazos instruado de E-o de la 8a ĝis la 12a horo en kvin diversgradaj kursoj: A — komencantoj, B — progresintoj, C — konversacia, D — estontaj instruantoj, E—tradukantoj.

Posttagmeze banado, sportado, ekskursoj, vespere — tendarfajroj kun kantado k. s.

La tendaranoj loĝos aŭ duope en tendoj, aŭ kvarope en kabanetoj. La tendarkotizo estas 1050 ĉeĥosl. kronoj, por bulgaroj pagebla surloke.

Por ĉiu etapo oni akceptos nur la unuajn 100 aliĝilojn ĝis la 15a de majo 1980. Post tiu ĉi dato estos akceptitaj tendaranoj nur se restos liberaj lokoj. El eksterlando oni preferas malakcepti kandidatojn por la unua grupo.

Por aliĝiloj kaj pliaj informoj skribu al: Esperanto-klubo, 67401 Trebiĉ, Ĉeĥoslovakio.

### *NIAJ FORPASINTINOJ*

Forpasis 85-jara en u. Sliven

***Zafirka Dimitrova,***

multjara e-istino, gvidantino de E-kursoj, elstara aganto de la urba E-societo „Espero", partopreninta en multaj naciaj kaj universalaj E-kongresoj.

*

En sia 50-jara aĝo la 22an de novembro subite forpasis en Sofio

***Stefka Ĥristova***

profesia jurnalistino, redaktorino de la elstara E-revuo „Nuntempa Bulgario" dum ĝia tuta eldonperiodo (14 jarojn), parolantino de la E-emisio de Radio Sofia. Bonege posedante la lingvon, ŝi majstre tradukis beletrajn verkojn de 34 bulgaraj aŭtoroj. Sia morto estas granda perdo por la bulgara E-movado.

### *FORPASIS VLADIMIR BELSKIJ*

En novembro 1979 en Leningrado 95-jara forpasis la E-veterano Vladimir Belskij.

Li naskiĝis en 1884 en u. Brjansk. Jam junulo k-do Belskij eniris la batalon kontraŭ la carismo kaj kapitalismo. Pro aktiva revolucia agado li estis ekzilita en nordo (nuna Komi ASSR). Tie en 1910 j. li komencis lerni E-on.

En oktobro 1917 k-do Belskij estis delegito de la II Tutrusia Kongreso de Laboristaj, Kamparanaj kaj Soldataj Deputitoj. Post la Oktobra Revolucio li laboris en multaj regionoj kiel arbarkulturisto kaj forstisto. Ĝis sia 80-jara aĝo li ne forlasis sian amatan laboron.

Dum sia tuta vivo Vladimir Belskij partoprenis aktive en la soveta E-movado.

Li estis granda amiko de la bulgara popolo.

Kliniĝon antaŭ lia hela memoro!



815IV

## NTERNACIA ESPERANTO-KURSEJO — FILIO EN VARNA

### *Bulgario, 1090 Sofio, p. k. 791*

1. ESPERANTO-KURSOJ:

| | | | |
|---|---|---|---|
| majo | 3—16; 17—30 | oktobro | 1—14; 16—29 |
| junio | 1—14; 16—29 | novembro | 1—14; 16—29 |
| septembro | 1—14; 16—29 | decembro | 1—14; 16—29 |

2. SILVESTRA BALO: 30. XII. 1980—3. I. 1981.

KULTUR-TURISMA PROGRAMO:

1. Busekskursoj al Varna: vizito de la akvario kaj la monumento de Vladislav Varnenĉik.
2. Busekskurso al Balĉik — vizito de la botanika ĝardeno kaj la palaco de la rumana reĝino Maria.
3. Kursoj de Esperanto — 4 horojn tage.
4. Prelegoj kaj projekciado de diapozitivoj.
5. Amuzvesperoj kun diskoteko.
6. Transporto de la stacidomo kaj la flughaveno ĝis la ripozdomo kaj reen estas inkluzivita en la partoprenkotizo.

PARTOPRENKOTIZOJ:

| a. Kursoj | por alilandanoj | por bulgaroj |
|---|---|---|
| en majo | 182 lv. | —112 lv. |
| en junio | 210 lv. | —140 lv. |
| en septembro | 210 lv. | —140 lv. |
| en oktobro | 182 lv. | 112 lv. |
| en nov. kaj decembro | 168 lv. | 98 lv. |
| **b. Silvestra Balo** | 100 lv. | 70 lv. |

## deziras korespondi

***Bulgario***

Grupo de 15 gelernantoj de la 5 ĝis la oka klasoj dez. korespondi tutmonde. Komuna adreso: 4348 selo Kliment, Plovdivsko, foto-klubo „Esperanto". Respondo certa!

***Pollando***

Mieczyslaw Krzypczak — Komorow 48, 36—110 Majdan Krolewski (23-jara — pri muziko, dancoj, sporto, fotografado, lingvoj, arkitekturo, literaturo, teatro ka.)

Geedzoj junaj: Gledzinski Andrzej, 44—100 Glivice, ul. Libelta 12/2 (li — 30-jara, ŝi — 24-jara — kun bulgaraj e-istoj — pri turismo, arkitekturo, mekaniko, E-to literaturo)

Junaj e-istoj, 16 — 17-jaraj gelernantoj — pri scienco, kulturo, muziko, arto. Komuna adreso: Esperanto-klaso 2d, Liceo Ogolne, PL 08-400. Andreo Bobktewicz — 50—138 Wroclaw, str. Szewska n-ro 63/m. 2 (20-jara studento — kun tuta mondo — pri literaturo kaj poezio, filozofio, E-tradukoj, sporta kaj amatora alpinismo, vojaĝado ktp)

Romuald Skalinski — ul. Szczytna 6 m 3 87—100 Torun (46-jara instruisto — kun seriozaj e-istoj el Sofio).

***GRAVA ATENTIGO!***

**La Distrika-Urba Estraro de Bulgara E-Asocio en Sofio havas novan adreson: 1000 Sofia, p. k. 268.**

## SOMERA ESPERANTISTA FAMILIA TENDARO (SEFT) 23—30. VIII. 1980, GDR

**Loko**: Tendejo en arbara kaj romantika lagoriĉa regiono de distrikto Neubrandenburg.

**Ideo**: Komuna tendumado de e-istoj, dezirantaj perfektigi siajn lingvokonojn en konstanta parolpraktiko.

**Kondiĉoj**: Ĉiu partoprenanto mem zorgas pri sia tendo, manĝado ktp. Nuran servon, kiun ni faras: peri la adresojn inter interesuloj kaj doni kelkajn informojn pri la regiono, vojaĝeblecoj ka.

**Nutraĵoj**: el la tendeja vendejo.

**Aliĝoj**: ĝis la fino de majo.

**Adreso**: Distrikta laborrondo Esperanto, s-ro Werner Pfennig, Leibnizstr. 5/67, Neubrandenburg, GDR.

## TRA LA GAZETARO

### *Valora eldonaĵo de „Moscow News"*

En n-ro 51/1979 de la anglalingva ĵurnalo „Moscow News" (Moskvaj Novaĵoj) aperis 16-paĝa esperantlingva suplemento, kiu entenas valorajn materialojn:

1. Parolado de Leonid Iliĉ Brejnev en Berlino je la 6 de oktobro 1979.
2. Parolado de A. A. Gromiko en plenkunsido de la 34a sesio de la Generala Asembleo de UN
3. Artikolo „La milita malstreĉiĝo estas bezono de la nuntempo" de D. Ustinov, ministro pri defendo de USSR.
4. Respondo de L. I. Brejnev al demando de korespondanto de ĵ. „Pravda" (7. XI. 79).
5. Projekto de Rezolucio pri neallaseblo de politiko de hegemoniismo en la internaciaj rilatoj.

Tiuj dokumentoj ankoraŭfoje plej aŭtoritate konigas al la mondo la sincere pacaman politikon de la Komunista Partio kaj la Registaro de Sovetunio.

•

En ĵ. **„Kubratski Zov"**, u. Kubrat (18. X): sub titolo „Rezultodona renkontiĝo" aperis letero de Laslo Kalman, prezidanto de la Laborista Kooperativo en u. Varpalota, Hungario. Pere de E-o tiu kooperativo kontraktis kun la Regiona Konsumkooperativo en Kubrat.

En ĵ. **„Narodna Armija"**, organo de la Ministerio de Popola Defendo (27. X) artikolo: „60 jarojn partia organizaĵo en u. Dolna Orjaĥovica" de generalo Konstantin Ĥristov. Li emfazas la progreseman rolon de la E-grupo en la urbo kaj speciale de la pioniro de la E-movado en la lando Ĥristo Popov, loĝinta en tiu urbo.

En ĵ. **„Borba"**, V. Târnovo (25. X.): informo pri la solena malfermo de la nova lernejaro de E-o.

*(El paĝo III)*

AŬSTRIO. Post prezento de disertacio pri la aŭstria E-movado ĝis 1918 Wolfgang Bahr (studento de la universitato en Vieno) fariĝis doktoro pri filozofio. La studmaterialon disponigis al li la Internacia E-Muzeo en Vieno.

HISPANIO. Funkcias E-kursoj en 81 diversgradaj lernejoj, inkluzive de pluraj universitatoj. La landa sekcio de Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj nombras pli ol 300 aktivajn membrojn. Krome, ĉ. 400 pedagogoj kaj studentoj aliĝis al la korespondaj E-kursoj.

ITALIO. La Triesta E-Asocio aranĝis E-budon ĉe la Internacia Specimen-Foiro.

SIRIO. En la ĉefurbo Damasko studentoj kaj entuziasmaj interesuloj lernas la internacian Lingvon. Adreso: M. Gassan T. Mausily, 7 Maussily Bldg., St. Omar Ibn Al-Kattab, Mal'ab, Hazra'ah, Damascus.

**El „Informilo de IEMW", n-ro 4/79**

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL